

# PROTOKOLO

## pri la kunveno de la Komitato de TEJO en Vroclavo mardo, la 19-a de julio 2016

protokolita kaj raportita de la TEJO-volontulo KuboF Hromoslav  
sub respondeco de la Ĝenerala Sekretario Arina Osipova

### PARTOPRENINTOJ

#### Estraro

1. Michael Boris Mandirola (Prezidanto)
2. Arina Osipova (Ĝenerala Sekretario)
3. Juliana Evandro (Vicprezidanto)
4. Ariadna García Gutiérrez (Estrarano)

#### Ne ĉeestis:

1. Cédric Marchal (Kasisto)

#### Komitatanoj (*vidu suplementon 1*)

16 Komitatanoj A

2 Komitatanoj B

2 Komitatanoj C (estis elektitaj dum la Kunsido)

#### Volontuloj

1. Michal Matúšov “KuboF”
2. Jérémie Bert (ĉeestis partatempe)

### 1. MALFERMO

Michael Boris, la prezidanto de TEJO, malfermis la kunsidon de la Komitato je 10:19 (19 minutoj post la planita komenco).

### 2. EVENTUALA ELEKTO DE PREZIDANTO DE LA KOMITATO

Michael Boris informis, ke la Komitata Kunsido devas havi sian prezidanton. La rolon kutime plenumas la prezidanto de TEJO. Ĉar la prezidanto de TEJO ĉeestas, li fariĝas la prezidanto de la Komitata Kunsido.

### **3. ELEKTO DE VOĈDONA KAJ PROPONA KOMISIONOJ**

#### **3.1. Elektro de voĉdona komisiono**

Kiel membroj de la voĉdona komisiono kandidatiĝis Lucas BARBOSA kaj Vít Guiguelmo MIŠUREC. La Komitato akceptis la kandidatojn,

#### **3.2. Elektro de propona komisiono**

Kiel membroj de la propona komisiono kandidatiĝis Rogier Huurman kaj Joop Kiefte. La Komitato akceptis la kandidatojn,

#### **3.3. Kontrolo de la kvorumo**

Entute estas 35 komitatanoj de TEJO (28 Komitatanoj A, 2 Komitatanoj B, 0 Komitatanoj C, 5 Estraranoj). Konsekvence la kvorumo estas 12 ĉeestantoj.

La kunsidon partoprenis 22 komitatanoj (16 Komitatanoj A, 2 Komitatanoj B, 0 Komitatanoj C, 4 Estraranoj). La kvorumo estas atingita.

### **4. FIKSO DE CETERA TAGORDO** (*vidu suplementon 2*)

Ana Ribeiro mallonge komentis pri la tagordo, Enric Baltasar klarigis pri siaj proponitaj tagorderoj.

La Komitato voĉdonas pri la akcepto de la tagordo.

#### Rezulto de la voĉdono:

- Por: 20
- Kontraŭ: 0
- Sindetenis: 1

La tagordo estis akceptita.

### **5. ELEKTO DE KOMITATANOJ C**

#### **5.1. Kandidatoj por Komitatano C**

Michael Boris klarigis la regulojn por la elekto. Entute estas 29 komitatanoj (27 komitatanoj A kaj 2 komitatanoj B). Pro la nombro de Komitatanoj A kaj B, povas esti elektitaj maksimume 7 Komitatanoj C.

Juliana Evandro proponis Joop Kiefte. Arina Osipova proponas Paweł Fischer-Kotowski. Ambaŭ proponitoj akceptas.

Oleksandra Kovyazina “Saša Murr” (Respondeculo pri Konsilio de Eŭropo) atentigis, ke por Komitatano C nun rajtas kandidatiĝi nur membroj de TEJO sub 30 jaroj malgraŭ la posta

tagordero pri ŝanĝo de aĝlimo eventuale al 35. Michael Boris atentigas, ke la proponitan ŝanĝon devos unue akcepti la Komitato de UEA.

## **5.2. Voĉdono pri la kandidatoj**

La Komitatanoj ricevis 2 balotilojn por Paweł Fischer-Kotowski kaj Joop Kieft. La voĉdono estis sekreta.

### Rezulto de la voĉdono:

Joop Kieft: 16 voĉoj, akceptita

Paweł Fischer-Kotowski: 16 voĉoj, akceptita

Ekde nun la Kunsidon partoprenas 24 komitatanoj:

16 Komitatanoj A

2 Komitatanoj B

2 Komitatanoj C

4 Estraranoj

## **6. 35-JARIĜO DE MEMBROJ**

### **6.1. Prezento de la proponita ŝanĝo**

Estis proponita ŝanĝo de aĝlimo de TEJO-membroj. Ĝis nuna aĝlimo estas “sub 30 jaroj”; nove proponitaj aĝlimoj iras ĝis “ĝis 35 jaroj”. Al ĉefaj kialoj apartenas:

- adaptiĝo al ŝanĝiĝinta mondo, kie juneco en pluraj mondopartoj ŝoviĝis al posta aĝo; ekzemple pluraj Eŭropaj organizoj starigis la limon 35 jaroj;
- oficialigo de membreco de kernaj aktivuloj de TEJO, kiuj nun aĝas pli ol 29 jaroj (kaj konsekvence ne estas TEJO-membroj) sed agas pri TEJO-aferoj en eksteraj instancoj, kiuj akceptas pli altan aĝlimon;
- plutenado de membroj, kiuj jam sufiĉe spertiĝis kaj povas transdoni siajn sciojn kaj spertojn al pli junaj membroj kaj aktivuloj;
- havigo de pli multaj membroj.

Okazis longa kaj vigla diskutado ene de la Komitato kun partopreno de homoj ekster la Komitato kaj nemembroj de TEJO.

### **6.2. Difino de “juneco”**

Ĝis 1980-aj jaroj estis aĝlimo de TEJO 24 jaroj kaj TEJO funkciis. Tiam estis la supra aĝlimo ŝanĝita al 29 jaroj.

Pluraj partoprenantoj defiis la demandon, kio estas limoj de “juneco”. Diversaj organizoj havas diversajn limojn. En Eŭropo estas kutima supra limo inter 30 kaj 35; en Afriko estas 35 jaroj jam signife alta aĝo; en Ĉinio estas ĉirkaŭ 40. En internaciaj organizoj en kiuj TEJO membras estas supra limo elde 24 ĝis 35.

Juneco estas kutime difinata laŭ diversaj aferoj rilataj al edukado, dunglaborado, familio ktp. Sed tiuj aferoj estas malfacile kontroleblaj por ĉiuj unuopaj homoj, do kutime estas starigita iu preciza, facile kontrolebla limo, kiu estas pli-mapli avaraĝa por ĉiuj.

### **6.3. Diferencoj inter plej junaj kaj plej maljunaj membroj**

Estis starigita demando pri diferencoj en pensado inter plej junaj kaj plej maljunaj membroj (laŭ la starigitaj proponoj). Iuj partoprenantoj asertis, ke inter 18-jaruloj kaj 35-jaruloj estas granda diferenco kaj tiuj homoj ne povos bone kunlabori. Venis atentigo, ke tiu diferenco estas granda, sed estas avantaĝo ĉar plimultigas opiniojn kaj vidmanierojn kaj TEJO lernu aŭskulti unu la alian por veni al bona fina komuna decido. Aliaj asertis, ke la diferencoj ne estas tro grandaj, speciale kompare al situacio junuloj-maljunuloj (“grizharuloj”) kiel ekzemple en UEA.

### **6.4. Logado de tre junaj membroj**

Iuj partoprenantoj asertis, ke plialtigo de aĝlimo ne solvos la problemon pri mankantaj homfortoj kaj strebo logi tre junajn homojn por membreco. Supozata kialo estas, ke aktivularo de TEJO plue dependos de pli maljunaj, pli spertaj aktivuloj kaj pigros strebi allogadi tre junajn membrojn kaj liberigadi taskojn por ili.

Laŭ nuntempaj spertoj, tre junaj komitatanoj (aĝantaj sub 18) estas bone akceptataj kaj aŭskultataj, sed ne ĉiam (ekz. dum tiu ĉi kunsido) multe parolas. Veronika Venislovas (Komitatano A por HEJ) estas plej juna komitatano, ŝi argumentis, ke tre junaj Komitatanoj silentas pro ne tre multaj spertoj, kio kaŭzas, ke ili havas malmulton por diri.

### **6.5. Agadlokoj por tre junaj membroj**

Venis argumento, ke en situacio, kie estas multaj ne tre junaj aktivuloj, tre junaj potencialaj aktivuloj povos timi preni iun taskon aŭ funkcion. Michael Boris kontraŭargumentas, ke nuntempe en TEJO ne estas manko da liberaj taskoj kaj pozicioj, ekzemple pluraj komisionoj ne havas sian komisiiton, estas ĝenerala manko de homfortoj en TEJO, do ne tre junaj membroj ne fortimigas la nuntempajn tre junajn membrojn.

## **7. PLIIGO DE EBLOJ AL KUNSIDANTAJ KOMITATANOJ: ANSTATAŬIGO KAJ RETPARTOPRENO**

### **7.1. Anstataŭado de Komitatanoj B kaj C**

Enric Baltasar argumentas, ke ne estas diferenco inter Komitatanoj A (kiuj estas anstataŭeblaj dum Komitata Kunsido) kaj Komitatanoj B kaj C (kiuj ne estas anstataŭeblaj dum Komitatkunsido) kaj proponas, ke Komitatanoj B kaj C estus anstataŭeblaj. Kontraŭargumento estis, ke Komitatanecoj B kaj C estas specifaj al konkreta persono. Komitatanojn A elektas landaj kaj fakaj sekcioj kaj tiuj sufiĉe facile povas anonci anstataŭon. Male, Komitatanojn B elektas individuaj membroj, kiuj malfacile povus nomumi anstataŭanton. Simile validas por Komitatanoj C, kiujn elektas la Komitato. Laŭ propono de Enric eblus, ke Komitatano B aŭ C nomumi sian anstataŭanton kun klaraj instrukcioj kiel voĉdoni, kaj kaze de alia voĉdonado, la anstataŭanto sindetenu.

### **7.2. Reta partopreno de Komitatanoj**

Enric Baltasar proponis ebligi retan partoprenon de Komitatanoj, kiuj ne ĉeestas Komitatkunsidon kaj ne nomumis sian anstataŭanton. Tio plibonigus partoprenon en la Komitatkunsido kaj ebligus facilan rektan partoprenon al Komitatanoj, kiuj pro diversaj (financaj, vizaj, tempaj ktp) kialoj ne povas fizike ĉeesti.

Michael Boris atentigis, ke reta partopreno laŭ Nederlanda leĝo (kiun TEJO devas laŭi, ĉar TEJO estas registrita en Nederlando) eblus nur, se ĝi estus eksplike menciita en la statuto, kio nun ne estas.

La Komitato diskutis ĉu postulo pri bona reta konekto estus unu el kondiĉoj por organizado de sekvaj IJK-j (por ebligi retan kunsidon). La ĝenerala etoso estis, ke aliaj kriterioj pli gravas. Piere Vittet (Komitatano A por JEFO) starigis demandon, ĉu Komitatkunsidoj estu almenaŭ vive videoelsendataj. Ana Ribeiro atentigis, ke kaze de nesufiĉa reto por videa partopreno / viva elsendado, eblus fari skriban vivan elsendadon.

## **8. STATUTO, REGULARO KAJ REGLAMENTOJ**

### **8.1. Proceduro de la diskuto pri amendoj**

Michael Boris transdonis gvidadon de tiu ĉi parto al la vicprezidanto Juliana Evandro.

Komitatanoj ricevis la koncernajn dokumentojn retroŝte, dum la Kunsido la dokumentoj estis disponeblaj papere.

Por altigi efikecon estis starigita nova proceduro de diskutado pri amendoj, krom tiuj pri formalajtoj: Juliana Evandro, kiel gvidanto, legos la nomon de la proponinto kaj la proponon.

La proponinto rajtas komentis sian amendon. Poste voĉon ricevos 1 kontraŭanto kaj 1 poranto de laamendo. Fine de la diskuto la Estraro prezentos sian opinion.

## **8.2. Amendoj pri la Statuto de TEJO (vidu suplementon 3)**

### **8.2.1. Amendoj pri formalajoj**

Laŭ la propono de Michael Boris Mandirola ĉiuj formalajoj estis voĉdonitaj kune. La proponon neniu kontraŭis.

Paweł Fischer-Kotowski atentigis, ke numerado de punktoj estas alia ol supozite. Michael Boris Mandirola klarigis, ke la “fina versio”, kiun ricevis la Komitato estis intertempe ŝanĝita (estis korektita numerado de iuj punktoj, ĉar origine ili ne sekvis ĝuste). Paweł konsideris maltaŭge voĉdoni pri dokumentoj, kiuj estis intertempe ŝanĝitaj, sed la ŝanĝoj estis minimumaj kaj alia homoj ne kontraŭis.

La Komitato pretas voĉdoni. La voĉdono ne estas sekreta.

#### Rezulto de la voĉdono:

- Por: 18
- Kontraŭ: 0
- Sindetenis: 1

Ĉiuj formalajoj estas akceptitaj.

### **8.2.2. Ŝanĝoj de la nomoj de membrokategorioj**

Enric Baltasar proponas renomi la membrokategoriojn pro simpligo kaj klareco:

*Komitatano A = Pororganiza Komitatano*

*Komitatano B = Pormembra Komitatano*

*Komitatano C = Porfavorula Komitatano*

*Komitatano Ĉ = Aldonvalora Komitatano*

Laŭ Enric Baltasar tiuj nomoj plifaciligus laboradon.

Tomasz Szymula male opinias, ke tiu renomo nur malplifaciligus laboradon.

La Estraro kontraŭas, ĉar la propono ne aldonas klarecon sed konfuzon.

La Komitato pretas voĉdoni.

#### Rezulto de la voĉdono:

- Por: 2
- Kontraŭ: 14
- Sindetenis: 3

La amendo estas malakceptita.

### **8.2.3. Amendo pri la punkto 1. Establo**

Veronika Poór (Ĝenerala Direktoro) proponas aldoni sekvan linion post la punkto (4):

*TEJO ne disdonas profiton inter siaj membroj.*

Michael Boris klarigis, ke profito estas divido de gajno inter membroj.

La Estraro poras la amendon

La Komitato pretas voĉdoni.

Rezulto de la voĉdono:

- Por: 7
- Kontraŭ: 4
- Sindetenis: 9

La amendo estas akceptita.

### **8.2.4 Amendo pri la punkto 8. Landaj sekcioj**

Michael Boris Mandirola proponas aldoni kroman kriterion por landa sekcio:

*(2) (viii) havas almenaŭ 3 kalkuleblajn membrojn*

Michael Boris Mandirola asertis, ke Landa Sekcio kun malpli ol 3 membroj estas ridinda. Li klarigis, ke eksigo de Landa Sekcio ne estus aŭtomata, sed estus farita per decido de la Komitato. Rogier Huurman klarigis, ke en la propono temas pri akcepto kiel Landa Sekcio de TEJO kaj pri ekzisto de la organizo mem.

La Komitato pretas voĉdoni.

Rezulto de la voĉdono:

- Por: 15
- Kontraŭ: 2
- Sindetenis: 3

La amendo estas akceptita.

### **8.2.5. Amendo pri la punkto 9. Fakaj sekcioj**

Michael Boris Mandirola proponas aldoni kroman kriterion por faka sekcio:

*(2) (viii) havas almenaŭ 3 kalkuleblajn membrojn*

La argumentado estas sama kiel pri landaj sekcioj.

La Komitato pretas voĉdoni.

Rezulto de la voĉdono:

- Por: 12
- Kontraŭ: 2
- Sindetenis: 5

La amendo estas akceptita.

**8.2.6. Amendoj pri la aĝlimo (punkto 10. Membroj)**

Venis pluraj amendoj rilataj al aĝlimo por membroj de TEJO. La teksto de la lasta malneto de la Statuto indikas la aĝon 35 jaroj. Tial okazos sinsekva voĉdonado ekde plej alta aĝo ĝis malplej alta, se la proponita amendo pri aĝo estos akceptita, la voĉdonado transiros al sekva amendo pri malpli alta aĝlimo, se estos malakceptita, validos la plej malalta jam akceptita aĝo. Juliana Evandro proponis ŝanĝi aĝlimon al 34:

*(i) kiuj aĝas ĝis inkluzive ~~35~~ 34 jarojn je la komenco de la jaro;*

La Estraro kontraŭas la amendon kaj preferus lasi aĝlimon 35 jaroj.

La Komitato pretas voĉdoni.

Rezulto de la voĉdono:

- Por: 5
- Kontraŭ: 11
- Sindetenis: 4

La amendo estas malakceptita.

Laŭ la starigita proceduro estis decidita la aĝlimo de 35 jaroj.

**8.2.7. Amendo pri financa subteno al junaj membroj (punkto 10. Membroj)**

Ana Ribeiro proponas aldoni novan regulon por adoleskaj membroj:

*Membroj inter 12 kaj 18 jaroj, ĉiam kiam eblas laŭ la financaj kondiĉoj de la organizo, iĝus individuaj membroj senpage. Kaze, la financaj kondiĉoj ne permesigos tion, ili ricevos rabatojn laŭ eble.*

La proponinto opinia, ke por adoleskuloj estas malfacile pagi pro manko de mono kaj adoleskuloj estu ne nur “Amikoj de Esperanto”.

Pierre Vittet subtenis la proponon, tamen li kontraŭas, ke tiu regulo estu en la Statuto.

La Estraro kontraŭas la amendon. Ekzistas la Fondaĵo Canuto, kiu helpas en tiaj okazoj. Krome la vortumo de la amendo estas tro svaga.

La Komitato pretas voĉdoni.



#### Rezulto de la voĉdono:

- Por: 2
- Kontraŭ: 8
- Sindetenis: 10

La amendo estas malakceptita.

Tamen Joop Kiefto proponis postan diskuton en la reto pri tiu temo.

#### **8.2.8. Amendo pri la punkto 12. Eksigo**

Michael Boris Mandirola proponas aldoni sekvan frazon al:

*Aliĝinta asocio aŭ individua membro, kiu evidente kontraŭlaboras la celojn de TEJO, morale aŭ materie damaĝas ĝin, aŭ ne kontentige plenumas siajn devojn al ĝi aŭ la **minimumajn kriteriojn laŭ la ĉapitro 3**, povas esti eksigita el la Asocio.*

Laŭ Michael Boris Mandirola kondiĉoj por iĝi landa aŭ faka sekcio devas esti plenumitaj ne nur aliĝante sed ankaŭ poste.

La Estraro subtenas la ideon.

La Komitato pretas voĉdoni.

#### Rezulto de la voĉdono:

- Por: 12
- Kontraŭ: 5
- Sindetenis: 3

La amendo estas akceptita.

Rogier Huurman proponis aldoni al Ceteraĵoj parton pri eksigontaj Landa kaj Fakaj Sekcioj.

#### **8.2.9. Amendoj pri la punkto 13. Ĉefaj organoj**

Veronika Poór proponas 2 amendojn pri tiu punkto.

1. aldoni la frazon:

*(9) Estraraneco povas finiĝi en iu ajn momento:*

*- per eksigo, skribe komunikita al la Prezidanto, Ĝenerala Sekretario, aŭ Ĝenerala Direktoro;*

*- per eksigo fare de la Komitato de TEJO.*

Veronika Poór klarigas, ke nepras difini kiel finiĝas la estraraneco.

La Estraro aprobas la amendon.

La Komitato pretas voĉdoni.

Rezulto de la voĉdono:

- Por: 22
- Kontraŭ: 0
- Sindetenis: 0

La amendo estas akceptita.

2. aldoni la frazon:

*Fino de estraraneco ne signifas finon de komitataneco.*

Paweł Fischer-Kotowski kontraŭas la amendon, ĉar ne klaras kategorio de komitataneco.

La Estraro ankaŭ kontraŭas la proponon.

La Komitato pretas voĉdoni.

Rezulto de la voĉdono:

- Por: 0
- Kontraŭ: 17
- Sindetenis: 5

La amendo estas malakceptita.

Finiĝis voĉdonado pri amendoj pri la Statuto kaj la Komitato transiras al aprobo de tuta Statuto.

Ana Ribeiro petas iom alian proceduron por povi voĉdoni pri punkto pri elekto de membreco ĉu en TEJO aŭ ĉu en UEA. La procedura propono de Ana Ribeiro estis akceptita.

**8.2.10. Amendo pri elekto de membreco (punkto 10. Membroj)**

Ana Ribeiro proponas aldoni la frazon:

*(i) kiuj aĝas ĝis inkluzive 29 jarojn je la komenco de la jaro; kaj membroj inter 30 ĝis inkluzive 35 kiun esprimas la deziron por membriĝi en ambaŭ: UEA kaj TEJO;*

La proponinto argumentas, ke laŭ la demandaro farita al homoj inter 30 kaj 35, al membroj ekster la movado ĝenigas iĝi 35 jaraĝa membro de TEJO, kaj tio povus eĉ kaŭzi membroperdon en UEA. La sugesto estas ke oni rajtus elekti ĉu oni volas iĝi membro de TEJO kaj UEA, aŭ nur membro de UEA.

La Estraro kontraŭas, ĉar ĝin konsideras nenecesa kompliko al aliĝo kaj ne vidas utilon.

Rezulto de la voĉdono:

- Por: 4
- Kontraŭ: 11
- Sindetenis: 3

La amendo estas malakceptita.

### **8.2.11. Aprobo de la Statuto**

La Komitato transiris al voĉdonado pri aprobo de la tuta Statuto.

Paweł Fischer-Kotowski atentigis, ke ŝanĝo de la Statuto estas grava afero, kiu ne estas farata ofte, do estu bone pripensita. Pro lastminutaj neantaŭanoncitaj ŝanĝoj kaj tiklaj novaj temoj (ekzemple Amikoj de Esperanto) proponas ne akcepti la nuntempan proponon kaj plulabori ĝin. Michael Boris Mandirola laŭ peto de Paweł Fischer-Kotowski listigis kunlaborintojn pri la ŝanĝoj de la dokumentoj kaj klarigis, ke la Komitato estis konsultita dum longa tempo, dum 2 Kunsidoj, dissendoliste kaj rajtis proponi amendojn. Aperis kritiko, ke Komitata Kunsidoj estas ŝajndemokratio, ĉar Komitatoj ne vere estas kuraĝigataj al diskutado, kio estis kontraŭargumentita, ke pluraj Komitatoj diskutis, sed iuj ne volis aŭ ne havis tempon.

Michael Boris Mandirola atentigis, ke ŝanĝo de la Statuto estas tre inda afero, ĉar la ĝisnuna versio malplifaciligas laboradon (ekzemple pro manko de eblo de reta voĉdonado, manko de eblo subskribadi nome de TEJO ktp).

Aperis propono voĉdoni pri baza versio de la Statuto, kiu enhavos nur urĝajn kaj jure bezonatajn partojn kaj poste eblos pludiskuti kaj voĉdoni pri tiklaj partoj. Problemo estas, ke tia minimuma versio ne estas preta kaj la Komitato ĝenerale konsideris maltaŭge provi reverki la statuton dum unu horo.

Joop Kieffe rememorigas al la Komitatoj, ke ili rajtas voĉdone malakcepti la Statuton.

Aperis pluraj proponoj kiel pluigi la voĉdonadon.

Propono de Michael Boris Mandirola: Nun akcepti statuton. Ekde morgaŭ tiu, kiu volos ŝanĝon, faru ŝanĝon.

Propono de Bagó Sarolta: Nun akcepti leĝe minimuman Statuton, tiklajn temojn diskuti kaj voĉdoni poste.

Propono de Paweł Fischer-Kotowski: Nun sekrete kaj honeste voĉdoni pri nuntempa malneto kun la amendoj akceptitaj dum tiu ĉi kunsido.

La Komitato komencis voĉdoni per la propono de Paweł Fischer-Kotowski.

#### Rezulto de la voĉdono:

- Por: 15
- Kontraŭ: 2
- Sindetenis: 5

La propono estas akceptita, tial la aliaj proponoj ne estis voĉdonitaj

La Komitato voĉdonas sekrete pri la Statuto.

Propona komisiono vortumas la proponon: Akcepti nuntempan malneton de la Statuto kun ĵus akceptitaj amendoj.

Rezulto de la voĉdono:

- Por: 16
- Kontraŭ: 7
- Sindetenis: 0

La Statuto estas akceptita.

La Prezidanto fermas la unuan sesion de la Kunsido. Post la tagmanĝo je la 15h00 komenciĝas la dua sesio. La gvidadon de la Kunsido laŭ la peto de Julian Evandro daŭrigas Michael Boris Mandirola.

### **8.3. Amendoj pri la Kunlaboro inter TEJO kaj UEA (vidu suplementon 4)**

Lucas Barbosa da Silvia malĉeestas. La Komitato elektas novan homon por la voĉdona komisio. Veronika Venislovas kandiadatiĝas por la posteno. La Komitato akceptas.

#### **8.3.1. Amendoj pri paginstukcioj (ĉapitro 2, artikolo 3, punkto 2.i.a.)**

Veronika Poór proponas du amendojn.

1. forigi la tekston:

*(a) en okazo de sumo, kiu ne superas la 250-oblon de MA-kotizo por Nederlando, fare de aŭ prokure por la kasisto de TEJO aŭ la Ĝenerala Direktoro - la kasisto kaj la ĝenerala direktoro rajtas fari ĝeneralajn aprobojn ene de tiu limo; aŭ*

Anstataŭ ĝi aldoni la novan:

*(a) en okazo de sumo, kiu ne superas la 25-oblon de MA-kotizo por Nederlando, fare de aŭ prokure por la kasisto de TEJO aŭ la Ĝenerala Direktoro - la kasisto kaj la ĝenerala direktoro rajtas fari ĝeneralajn aprobojn ene de tiu limo; aŭ*

Veronika Poór klarigas, ke la unua sumo estis pli ol 10 000 EUR, ĉi-jare pri 16 000 EUR. Laŭ ŝi indas la sumon plimalaltigi por eviti troan riskon.

Neniu parolas por aŭ kontraŭ. Ankaŭ la Estraro ne esprimas sian opinion.

La Komitato pretas voĉdoni.

Rezulto de la voĉdono:

- Por: 4

- Kontraŭ: 7
- Sindetenis: 8

La amendo ne estas akceptita.

2. forigi la tekston:

*(a) en okazo de sumo, kiu ne superas la 250-oblon de MA-kotizo por Nederlando, fare de aŭ prokure por la kasisto de TEJO aŭ la Ĝenerala Direktoro - la kasisto kaj la ĝenerala direktoro rajtas fari ĝeneralajn aprobojn ene de tiu limo; aŭ*

Anstataŭ ĝi aldoni la novan:

*(a) en okazo de sumo, kiu ne superas la 250-oblon de MA-kotizo por Nederlando, fare de aŭ prokure por la kasisto de TEJO kaj la Ĝenerala Direktoro - la kasisto kaj la ĝenerala direktoro rajtas fari ĝeneralajn aprobojn ene de tiu limo; aŭ*

Veronika Poór klarigas, se ajnkaze eblas fari ĝeneralajn aprobojn, ŝi pensas ke pli taŭgas "kaj" kaj ne "aŭ". Pri financoj, ĉefe se tio povas endanĝerigi la financajn rimedojn de la estontaj agantoj, ni estu laŭeble prudentaj. Aldone, gravas eviti duoblajn pagojn, kaj "aŭ" pligrandigas la riskon de duoblaj elpagoj.

Neniu parolas por aŭ kontraŭ. La Estraro kontraŭas, ĉar tio malrapidigus decidadon.

La Komitato pretas voĉdoni.

Rezulto de la voĉdono:

- Por: 0
- Kontraŭ: 11
- Sindetenis: 7

La amendo ne estas akceptita.

### **8.3.2. Amendoj pri pagisntrukcioj (ĉapitro 2, artikolo 3, punkto 1.i.b)**

Venis du amendoj pri tiu ĉi punkto.

1. Michael Boris Mandirola proponas forigi la tekston:

*(b) en okazo de sumo, kiu superas tiun limon, fare de aŭ prokure por (1) la Kasisto de TEJO aŭ la Ĝenerala Direktoro kaj (2) la Prezidanto aŭ la Ĝenerala Sekretario de TEJO; kaj*

Anstataŭ ĝi aldoni la novan:

*(b) en okazo de sumo, kiu superas tiun limon, fare de aŭ prokure por (1) la Ĝenerala Direktoro kaj (2) la Prezidanto de TEJO; kaze de malkonsento inter (1) kaj (2), decido de la Kasisto estas valida; kaj*

Michael Boris Mandirola klarigas, ke kaze je urĝa pagendo, enplekti la Komitaton povus esti neebla.

Piere Vittet demandas, kiom ofte tio okazas. Michael Boris Mandirola ne vere memoras, kiam tio okazis.

Neniu parolas por aŭ kontraŭ. La Estraro subtenas la proponon.

La Komitato pretas voĉdoni.

Rezulto de la voĉdono:

- Por: 6
- Kontraŭ: 5
- Sindetenis: 10

La amendo estas akceptita.

2. Veronika Poór proponas forigi la tekston:

*(b) en okazo de sumo, kiu superas tiun limon, fare de aŭ prokure por (1) la Kasisto de TEJO aŭ la Ĝenerala Direktoro kaj (2) la Prezidanto aŭ la Ĝenerala Sekretario de TEJO; kaj*

Anstataŭ ĝi aldoni la novan:

*(b) en okazo de sumo, kiu superas tiun limon, fare de aŭ prokure por (1) la Ĝenerala Direktoro kaj (2) la Prezidanto de TEJO; kaze de malkonsento inter (1) kaj (2), decido de la Komitato estas valida kaj*

Veronika Poór klarigas, ke la juran respondecon havas la Prezidanto kaj la Ĝenerala Direktoro, kaj laŭ la origina formo povus esti ke okazas valida decido sen ilia enplektiĝo. Se iu respondecas pri io, tiu devas havi la rajton decidi pri tio.

Neniu parolas por aŭ kontraŭ. Ankaŭ la Estraro ne esprimas sian opinion.

La Komitato pretas voĉdoni.

Rezulto de la voĉdono:

- Por: 6
- Kontraŭ: 0
- Sindetenis: 17

La amendo estas akceptita.

### **8.3.3. Kromaj demandoj pri la Regularo**

Paweł Fischer-Kotowski rimarkigas, ke kutime la Centra Oficejo gardas 5% de kostoj de IJK.

Kial tio ne estas en tiu ĉi dokumento?

Michael Boris Mandirola respondas, ke tiu ĉi dokumento priskribas servojn, kiujn UEA provizas al TEJO senpage; pagendaj servoj estas en alia dokumento.

Paweł Fischer-Kotowski volas ricevi informon pri Kontakto: kiu prenas profiton kaj malprofiton.

Michael Boris Mandirola respondas, ke la revuon prizorgas TEJO, do tial TEJO prenas profiton kaj malprofiton.

Paweł Fischer-Kotowski demandas pri anstataŭanto de adminstranto de UEA - kiu de TEJO decidas?

Michael Boris Mandirola preferus, ke tio estu la Komitato. Tamen ĝis nun pri tio respondecas la Estraro.

#### **8.3.4. Aprobo de la Regularo inter UEA kaj TEJO**

Voĉdonado transiris al voĉdonado pri akcepto de la tuta, nove amendita Regularo inter UEA kaj TEJO.

Rezulto de la voĉdono:

- Por: 15
- Kontraŭ: 1
- Sindetenis: 5

La Regularo estas akceptita.

#### **8.3.5. Amendoj kaze je aprobo de la Ĝenerala Regularo de UEA dum UK 2016**

La komitato de TEJO decidis prepari amendon kaze je akcepto de la nova Ĝenerala Regularo de UEA fare de la komitato de UEA dum la tuj okazonta Universala Kongreso en Nitra (Slovakio).

La Komitato amendas la Regularon pri Kunlaboro inter UEA kaj TEJO jene:

- en ĉapitro 2. artikolo 1 punkto 1 enmeti novan linion antaŭ la unua linio:

*tridekonon de la kotizoj en la membrokategorio ora;*

- ŝanĝi en la unua linio 'MA-T' al "arĝenta" kategorio;

- ŝanĝi en la dua linio 'MJ-T' al "bronza" kategorio;

- forigi la trian linion:

*(iii) kvaronon de la kotizoj en la membrokategorio MG-T;*

- renumeru la liniojn en punkto 1 de artikolo 1;

- ŝanĝi en la ĉapitro 2, artikolo 3 ĉiun mencion de 'MA' al "arĝenta" kategorio.

Rezulto de la voĉdono:

- Por: 12
- Kontraŭ: 0
- Sindetenis: 11

La amendoj estas akceptitaj.

**8.4. Amendoj pri la Ĝenerala Reglamento de TEJO (vidu suplementon 5)**

**8.4.1. Kvanto de komitatanoj A (punkto 2)**

Michael Boris Mandirola proponas forigi unuaj 4 punktoj en la 2-a punkto kaj ŝanĝi la tekston al:

<i>Forigota teksto</i>	<i>Aldonota teksto</i>
<i>(1) Ĉiu landa sekcio rajtas al nombro de komitatanoj A laŭ la jena tabelo: Kalkuleblaj membroj Komitatanoj A 15-100 1 101-300 2 301-1000 3 1000+ 4</i>	<i>(1) Ĉiu landa sekcio rajtas al nombro de komitatanoj A laŭ la jena tabelo: Kalkuleblaj membroj Komitatanoj A 3-100 1 101-300 2 301-1000 3 1000+ 4</i>
<i>(2) Ĉiuj aliaj landaj sekcioj elektas kune komitatanojn A. Ilia nombro estas difinita laŭ la supra tabelo sumante iliajn kalkuleblajn membrojn, tamen almenaŭ unu.</i>	<i>(2) Ĉiu faka sekcio, kiu havas almenaŭ 3 kalkuleblajn membrojn, rajtas al 1 komitatano A.</i>
<i>(3) Ĉiu faka sekcio, kiu havas almenaŭ 15 kalkuleblajn membrojn, rajtas al 1 komitatano A.</i>	
<i>(4) Ĉiuj aliaj fakaj sekcioj elektas kune unu komitatanon A.</i>	

Laŭ Michael Boris estas senutile komplike, ke pluraj Landaj kaj Fakaj Sekcioj kunelektu unu komitatanon. Pli bonus, ke estus senpera reprezentando de niaj sekcioj en la Komitato.



En la Reglamento estas menciita *kalkulebla membro*. Paweł Fischer-Kotowski demandis, kiu membro de Landa Sekcio ne estas membro de TEJO? Michael Boris Mandirola klarigis, ke ekzemple membroj de Landaj Sekcioj aĝantaj pli ol 35 jaroj ne estas “kalkuleblaj”.

La TEJO-volontulo KuboF demandis kio estus, se Landa Sekcio ne pagas kotizon al TEJO pri siaj membroj. Michael Boris Mandirola respondis, ke tiuokaze Landa Sekcio ne havu Komitatanon.

Joop Kieft informis, ke NEJ havis proponon pri la temo, sed la propono de Michael Boris Mandirola estas pli bona.

La komitato pretas voĉdoni.

Rezulto de la voĉdono:

- Por: 19
- Kontraŭ: 0
- Sindetenis: 3

La amendo estas akceptita.

#### **8.4.2. Amendo pri anstataŭeblo de komitatanoj B, C kaj Ĉ (punktoj 3, 4 kaj 5)**

Enric Baltasar proponas forigi la tekston:

*Komitatano B, C kaj Ĉ ne estas por difinita kunveno anstataŭigebla.*

La amendo estas ligita kun la tagordero, kiu proponis Enric Baltasar (punkto 7 de la tagordo Pliigo de ebloj al kunsidantaj komitatanoj: anstataŭigo kaj retpartopreno)

Paweł Fischer-Kotowski kontraŭas la amendon. Komitatanoj B kaj C estas elektataj persone kaj reprezentas sian vidpunkton, tial ili ne estas anstataŭeblaj.

Joop Kieft rimarkigas, ke Komitatanoj B kaj C (por Amikoj de Esperanto) influas kvorumon

La Estraro sindetenas pri tiu amendo.

La voĉdono okazis aparte pri Komitatanoj B kaj C kaj pri Komitatanoj Ĉ.

La Komitato voĉdonas pri forigo de parto pri neanstataŭeblo de Komitatanoj B kaj C (elektataj de Individuaj membroj kaj Amikoj de Esperanto respektive).

Rezulto de la voĉdono:

- Por: 7
- Kontraŭ: 10
- Sindetenis: 6

La amendo estas malakceptita.

La Komitato voĉdonas pri forigo de parto pri neanstataŭeblo de Komitatoj Ĉ (elektataj fare de la Komitato pro siaj specifaj konoj, spertoj kaj kapabloj).

Rezulto de la voĉdono:

- Por: 5
- Kontraŭ: 9
- Sindetenis: 9

La amendo estas malakceptita.

#### **8.4.3. Amendo pri la oficperiodoj en la Estraro (punkto 6. Estraranoj)**

Michael Boris Mandirola proponas aldoni frazon al la teksto:

*(4) Estrarano, kiu ne estas elektita kiel la Prezidanto, la Ĝenerala Sekretario aŭ la Kasisto, povas esti elektita kiel Vicprezidanto. Ĉiu estrarano rajtas esti elektita por maksimume unu ofico kaj ne rajtas esti elektita al la sama ofico dum pli ol du sinsekvaj mandatoj.*

Michael Boris Mandirolas klarigas, ke temas pri junulara organizo, do gravas ke oni ne restu tro longe en la sama rolo, sed ke estu taŭga ŝanĝo de homoj en la postenoj. Kvar jaroj en la sama posteno sufiĉas, ne nur por Prezidanto.

Laŭ Bagó Sarolta akcepto de tiu propono solvos nenion.

La Estraro subtenas la proponon.

Rezulto de la voĉdono:

- Por: 21
- Kontraŭ: 0
- Sindetenis: 1

La amendo estas akceptita.

#### **8.4.4. Amendo pri aĝo de Estraranoj (punkto 6. Estraranoj)**

Ana Ribeiro proponas aldoni unu pozicion al la punkto 6. Estraranoj:

*(7) Membroj kun aĝo pli alta ol 30, nur rajtus esti elektitaj estraranoj kaze la elekta komisiono montrus ke la membro havas tre unikajn kapablojn, kiujn neniu alia malpli aĝa membro de TEJO havas, aŭ se la posteno riskus esti vaka.*

La celo de tiu amendo estas ne malinstigi plej maljunajn membrojn agadi. Kaj por ankaŭ instigi tiuj 30-aĝaj membroj ekagadi en UEA.

La Estraro kontraŭas. La Estraro preferas instigi junecon de Estraranoj per alia maniero, la vortumo estas nebula, jam estas limigo por ne preterpasi la aĝon 35 jaroj dum la mandato.

Ana proponas amendi sian amendon per aldono de *disponebla membro*.

Rezulto de la voĉdono:

- Por: 9
- Kontraŭ: 12
- Sindetenis: 2

La amendo estas malakceptita.

#### **8.4.5. Aprobo de la Ĝenerala Reglamento de TEJO**

Voĉdonado transiris al voĉdonado pri akcepto de la tuta, nove amendita Ĝenerala Reglamento de TEJO.

Paweł Fischer-Kotowski atentigis, ke laŭ la nuntempa Reglamento (kun la amendoj), volontulo aŭ oficisto povos esti Komitatano, kio ĝis nun ne eblis. Michael Boris Mandirola tion konsideras kaj mem preparos amendon por reta voĉdono.

Paweł Fischer-Kotowski proponas, ke vortumoj pri Komitatanoj prefere estu samaj kaj, ke Komitatano devas esti Individua membro de TEJO.

La Komitato pretas Voĉdoni pri akcepto de la amendita Ĝenerala Reglamento de TEJO.

Rezulto de la voĉdono:

- Por: 16
- Kontraŭ: 3
- Sindetenis: 4

La Reglamento de TEJO estas akceptita.

#### **8.5. Amendoj kaj voĉdono pri Reglamento pri IJK (vidu suplementon 6)**

Venis neniuj amendoj pri la Reglamento pri IJK. La Komitato decidis tuj voĉdoni.

Rezulto de la voĉdono:

- Por: 14
- Kontraŭ: 0
- Sindetenis: 9

La Reglamento pri IJK estas akceptita.

#### **8.6. Amendoj kaj voĉdono pri la Komitata reglamento (vidu suplementon 7)**

Anticipe estis interkonsentite ne fari surlokajn amendojn. Michael Boris Mandirola nun faras ilin, kio vokis malkontenton de kelkaj Komitatanoj, sekve Michael Boris Mandirola klarigas la agon.

### **8.6.1. Surloka amendo pri Prezidanto de la Komitata Kunsido**

En la Artikolo “Prezidado kaj protokolado” de la Reglamente estas skribite:

*La Prezidanto normale estas la Prezidanto de la Komitato.*

Michael Boris Mandirola tion konsideras maltaŭga, ĉar tio estas 2 tre malsamaj funkcioj kaj malfacilas bone faradi ilin ambaŭ samtempe. La propono estas, ke prefere La Estraro unu monaton anticipe proponu kandidatojn por Komitata Kunsido kaj la Komitato rete voĉdonu pri ili.

Paweł Fischer-Kotowski atentigis, ke por ŝanĝi Statuton sufiĉas anticipe unu semajno sed por elekti Prezidanton de Komitata Kunsido necesas havi unu monaton, kio ŝajnas esti malkongrua.

La Komitato pretas voĉdoni pri la nova amendo:

*La Komitaton prezidas Kunsidestro elektata de la Komitato mem. Ordinare la Estraro proponas unu aŭ pli da eblaj kunsidestroj plejmalfrue unu monaton antaŭ la Komitatkunsido kaj la Komitato elektas per reta voĉdono. Prefere la Kunsidestro ne estu Komitatano.*

Rezulto de la voĉdono:

- Por: 15
- Kontraŭ: 4
- Sindetenis: 4

La amendo estas akceptita.

### **8.6.2. Surloka amendo pri ŝanĝo de la nomoj de Komitatanoj**

Michael Boris Mandirola proponas ŝanĝi “komitatano C” al “komitatano Ĉ” pro antaŭaj decidoj.

Rezulto de la voĉdono:

- Por: 11
- Kontraŭ: 0
- Sindetenis: 12

La amendo akceptita

### **8.6.3. Surloka amendo pri Komisiitoj**

Michael Boris Mandirola proponas, ke Komisiitoj ne estu elektataj de Komitato, sed de la Estraro.

Michael Boris serĉis la precizan vortumon kaj trovis, ke pro teksto en alia parto la amendo ne havas sencon. Tial li retiris la amendon.

## **8.7. Reglamenteo pri elekto de Estraranoj (vidu suplementon 8)**

Michael Boris proponis aldoni parton, ke la Elekta komisiono serĉu kandidatojn kun diversaj loĝloko, genro kaj aĝo:

*La Komisiono zorgas ke inter la kandidatoj al la Estraro estu sufiĉe da diversaj kompetentoj kaj lertoj por kovri la ĉefajn agadkampojn de la Estraro. La Komisiono serĉu la kandidatojn strebante kunmeti teamon el diversa aĝo, genro kaj loĝloko.*

La Estraro subtenas la ideon.

### Rezulto de la voĉdono:

- Por: 22
- Kontraŭ: 0
- Sindetenis: 1

La amendo estas akceptita.

## **9. APROBO DE LA ESTRARA JARRAPORTO**

### **9.1. Diskuto pri la Jarraporto**

La Estraro prezentis al la Komitato sia raporton kelkajn tagojn antaŭ la Komitata Kunsido.

Paweł Fischer-Kotowski (Komitatano C) rimarkigis, ke en la Enkoduko la prezidanto skribas pri 3 oficistoj:

*... nun ni havas unu plentempan kaj du duontempajn oficistojn...*

Tamen nuntempe TEJO en sia stabo havas 1 plentempan kaj 1 duontempan oficistojn.

Krome Paweł Fischer-Kotowski atentigis, ke mankas informoj pri IJK 2015, kiuj bonus por arĥivaj celo kaj petis, ke sekvaj raportoj enhavu parton pri IJK.

Arina Osipova kiel Estrarano pri Kongresoj klarigis, ke la nuna Estraro estis elektita dum IJK 2015 en Wiesbaden. Pri IJK 2015 respondecis la antaŭa estrarano Tina Tišljär, tial nun tiu informo ne estas en la Raporto. Ŝi konsentas, ke tiu informo utilis.

La parto de la TEJO-Kasisto Cédric Marchal ne estis prezentita en la Raporto. Cédric ne verkis ĝin pro tre urĝaj laboraj kialoj.

Paweł Fischer-Kotowski ankaŭ ŝatus, ke la Raporto enhavu informojn pri plenumado de la Strategia plano de TEJO por 2014-2017. La Strategia plano difinis konkretajn paŝojn kaj limdatojn kaj pri tio ne estas mencio en la Raporto. La ĉeestantaj Estraranoj iome prezentis plenumadon de sia parto de la Strategia plano. La Komitato taskis la Estraron prilabori la

Jarraporton kaj aldoni informon pri plenumado de la Strategia plano en en la lasta jaro (IJK 2015 - IJK 2016) ĝis la 1-a de septembro 2016.

Laŭ peto de Paweł Fischer-Kotowski la Estraranoj rakontetis, ĉu ili estas kontentaj pri sia ĝis nun farita laboro en la Estraro en tiu ĉi oficperiodo kaj ĉu planas rekandidatiĝi. Montriĝis, ke nuntempaj Estraranoj havas tre multajn taskojn kaj estas superŝutitaj, divido de taskoj en la Estraro ne estas adekvata kaj la Estraranoj dum la oficperiodo neplanite transprenis taskojn de aliaj. Tomasz Szymula (Komitatano A por PEJ), iama Ĝenerala Sekretario, rekomendis, ke Ĝenerala Sekretario havu konstantan helpanton al kiu ĝi povas delegi certajn, ne tro gravajn taskojn kaj, ke Ĝenerala Sekretario prefere respondecu pri neniu Komisiono kaj koncentriĝu pri sekretaria laboro.

## **9.2. Voĉdono pri la Jarraporto**

La Komitato decidis ne voĉdoni nun pri la Jarraporto, ĉar

- ĝi estis prezentita sufiĉe malfrue al la Komitato kaj mankis tempo por atente legi ĝin;
- la Jarraporto ne estas plena kaj devas esti plilaborita.

La Estraro prezentas al la Komitato novan plenan Jarraporton ĝis la 1-a de septembro 2016.

## **10. APROBO DE LA FINANCA RAPORTO**

### **10.1 Diskuto pri la Financa Raporto**

La Financa raporto enhavis malbonajn informojn kaj entute mankis bilanco. Laŭ Tomasz Szymula tia raporto estas neakceptebla, pri kio Michael Boris konsentis.

### **10.2. Voĉdono pri la Financa Raporto**

La Komitato decidis ne voĉdoni pri la Financa Raporto. La Komitato taskis la Estraron prilabori la Financon Raporton kaj proponi ĝin al la Komitato por reta aprobo / malaprobo ĝis la 1-a de septembro 2016.

## **11. KONFIRMO DE KOMISIITOJ**

Arina Osipova prezentis la Komisionojn, kie nuntempe mankas komisiitoj:

- Adoleska Agado
- Edukado
- Landa Agado en Afriko
- Landa Agado en Ameriko
- Landa Agado en Azio

Enric Baltasar tuj konfirmis, ke li plu pretas gvidi Komisionon pri Landa Agado en Eŭropo. Lucas Barbosa (Komitatano A por BEJO) kandidatiĝis surloke kiel Komisiito pri Landa Agado en Ameriko. Paweł Fischer-Kotowski proponis, ke la Ĝenerala Sekretario sendu al la Komitata listo aktualan informon pri mankantaj Komisiitoj.

## **12. IJK EN AFRIKO**

Ana Ribeiro petis freŝajn informojn pri stato de IJK 2017.

Arina Osipova prezentis la nunan situacion. En la 1-a kandidatiĝperiodo estis 2 kandidatoj por la IJK. Unu estis konsiderita maltaŭga laŭ politikaj kondiĉoj, alia (temas pri Burundo) taŭgis sed intertempe la politika situacio en la lando ne stabiliĝis kaj ne estas konsiderata sekura. La Estrato voĉdoniĝis la Komitaton, sed tiu ne atingis kvorumon kaj la decido revenis al la Estraro. La Estraro decidis ne organizi IJK-n 2017 en Burundio pro politika situacio. Nun estas malfermita nova kandidatiĝperiodo. La rezultoj venos aŭguste.

Michael Boris Mandirola informis, ke strategia projekto de kunlaboro inter Eŭropo kaj Afriko, kiun TEJO kunordigas kaj kiu estas supozata signife helpi al la IJK 2017, estis akceptita. Laŭ Paweł Fischer-Kotowski subvencioj pli forte indikas vojon de TEJO ol la Strategia plano kaj Komitataj decidoj, sed Michael Boris klarigas, ke la subvencipetoj estis faritaj por havi rimedojn por plenumi la Strategian planon.

Danke al la subvencio venas granda subteno, ekzemple nun estos pagata laboro, sperto-interŝanĝo, aŭtune 2016 okazos trejnado en Benino, estos subvenciita veno de 72 (36 de Eŭropo, 36 de Afriko) partoprenontoj, 2 homoj venos 2 semajnojn antaŭ la IJK al la loko por surloke helpi kaj kunorganizi la kongreson. Dume ne eblas scii pri surlokaj organizantoj, ĉar ankoraŭ ne estis decidita loko; la nunaj kandidatoj estas Benino kaj Togolando. Bagó Sarolta (Komitatano A por HEJ) cerbumas, ĉu malpli ol 1 jaro sufiĉos por organizi tian eventon. Michael Boris Mandirola klarigis, ke pluraj informoj ne povis kaj ne povas esti publikigitaj, ĉar temas pri personaj informoj.

## **13. TEJO-EMBLEMO**

### **13.1. Diskuto pri la emblemoj**

Pro manko da tempo Michael Boris Mandirola proponas iom ŝanĝi la tagordon kaj preparoli tuj la punkton 15. La Komitato konsentis, tiel la punktoj pri Mallongaj volontuloj kaj Cirkuleroj estos preparolitaj poste.

La Prezidanto prezentas 4 emblemojn de TEJO (1 oficiala, 3 aliaj uzataj / uzitaj) kaj atentigas, ke por organizo gravas havi koheran grafikan identecon kaj uzadi nur unu emblemon. La Komitato antaŭ jaroj oficialigis emblemon, pri kiu nuntempe homoj ne kontentas. Juliana Evandro proponas oficialigi tiun, kiu estas uzata en vizitkartoj, do ŝanĝi iaman Komitatan decidon.

Paweł Fischer-Kotowski ripročas, ke tiaj ĉi aferoj estas trapuŝataj fine de la Komitata Kunsido en tempa hasto, malgraŭ, ke la emblemoj povintus esti afiŝitaj en la IJK-ejo kaj homoj povis komenti ilin. Joop Kieft (Komitatano C) rememorigis pri iama publika konsulto, kies rezultoj estis ignoritaj jam post kelkaj tagoj. Ana Ribeiro proponas sendi en sociaj retejoj de similaj organizoj por inspiriĝi. Pierre Vittet proponas listigi ĉiujn emblemojn de TEJO publike kaj klare diri, kiu estas oficiala.

Tomasz Szymula rememorigis pri iama Komitata diskuto en 2014 pri la temo de emblemo. Tiam Przemysław Wierzbowski proponis, ke tiama propono por emblemo ne estu akceptita, ĉar ĝi estas nur bona, sed TEJO meritas bonegan.

### **13.2. Voĉdono pri la emblemoj**

Pro tempomanko la voĉdono pri la emblem ne okazis.

## **14. CETERAĴOJ**

Pro tempomanko la tagordero ne estis pridiskutita.

## **15. FERMO**

La prezidanto dankis al ĉiuj pro partopreno kaj fermis la Kunsidon.



## ĈEESTANTAJ KOMITATANOJ

<b>N<sup>o</sup></b>	<b>Nomo, organizo</b>	<b>Komitatanoj</b>	<b>Anstataŭanto</b>
1.	Lucas Barbosa da Silva (BEJO)	Kom. A	
2.	Vit Guglielmo Mišurec (ĈEJ)	Kom. A	
3.	Pierre Vittet (JEFO)	Kom. A	
4.	Tabea Maltry (GEJ)	Kom. A	Eloy Guerra Olivar
5.	Sarolta Bagó (HEJ)	Kom. A	
6.	Veronika Venislovas (HEJ)	Kom. A	
7.	Michele Guerriero (IEJ)	Kom. A	Michael Boris Mandirola
8.	Emanuele Regano (IEJ)	Kom. A	Michael Boris Mandirola
9.	Pere Garau Borràs (KEJ)	Kom. A	
10.	Ivan Camilo Quintero Santacruz (KOLOMBEJO)	Kom. A	Lucas Barbosa da Silva
11.	Spencer van der Meulen (NEJ)	Kom. A	
12.	Romualda Jeziorowska (PEJ)	Kom. A	
13.	Tomasz Szymula (PEJ)	Kom. A	
14.	Kirill Noviĉenko (REJM)	Kom. A	Enric Baltasar
15.	Tomas Stano (SKEJ)	Kom. A	Vit Guglielmo Mišurec
16.	Alexandre Raymond (EUROKKA)	Kom. A	Lucas Barbosa da Silva
17.	Ana Ribeiro	Kom. B	
18.	Enric Baltasar	Kom. B	
19.	Paweł Fischer-Kotowski	Kom. C	
20.	Joop Kiefte	Kom. C	

## **TAGORDO DE LA KOMITATA KUNSIDO**

1. Malfermo
2. Eventuala elekto de prezidanto de la Komitato
3. Proponoj pri:
  - 3.1. Voĉdona Komisiono
  - 3.2. Propona Komisiono
4. Fikso de cetera tagordo
5. Elekto de Komitatanoj C
6. 35-jariĝo de membroj
7. Pliigo de ebloj al kunsidantaj komitatanoj: anstataŭigo kaj retpartopreno
8. Statuto, regularo kaj reglamentoj
9. Aprobo de la estrara raporto
10. Aprobo de la financa raporto
11. Konfirmo de komisiitoj
12. IJK en Afriko
13. Mallongtempaj volontuloj
14. Cirkuleroj
15. TEJO-emblemo
16. Ceteraĵoj
17. Fermo

# STATUTO DE TUTMONDA ESPERANTISTA JUNULARA ORGANIZO

## ĈAPITRO 1 CELOJ KAJ AGADO

### 1. Establo

- (1) TUTMONDA ESPERANTISTA JUNULARA ORGANIZO (ekde nun en la Statuto: TEJO) estas per tiu ĉi statuto establita kiel asocio.
- (2) TEJO havas sian sidejon en Rotterdam, Nederlando.
- (3) TEJO estas establita por nedifinita daŭro.
- (4) TEJO ne estas profitocela organizo.
- (5) TEJO ne disdonas profiton inter siaj membroj.
- (6) Kalendaraj aludoj estas interpretendaj laŭ la gregoria kalendaro, kaj la librotena jaro estas de la 1-a de januaro ĝis la 31-a de decembro.

### 2. Junulara sekcio de UEA

- (1) TEJO estas la junulara sekcio de UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO ("UEA"), internacia organizo ekzistanta kun jura personeco laŭ la leĝoj de Nederlando.

### 3. Celoj

La celoj de TEJO estas:

- (i) disvastigi la uzadon de la internacia lingvo Esperanto;
- (ii) kontribui al la evoluo de la Esperanta kulturo;
- (iii) agadi por la solvo de la lingva problemo en internaciaj rilatoj kaj faciligi la internacian komunikadon;
- (iv) plifaciligi la ĉiuspecajn spiritajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, sendepende de diferencoj rilate al nacieco, raso, sekso, religio, politiko aŭ lingvo;
- (v) helpi la junularon havi aktivan rolon en konstruo de socio inkluziva, internacia, interkompreniĝa kaj rajtrespekta;
- (vi) kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco, disvolvante ĉe ili la komprenon kaj estimon por aliaj popoloj;
- (vii) plibonigi la konojn kaj organizajn kapablojn de siaj aktivuloj kaj instigi ilian kulturan evoluon; kaj
- (viii) liveradi junajn fortojn al la Esperanta movado.

#### **4. Agado**

(1) TEJO aplikas en sia agado metodojn, kiuj respondas al la interesoj de la junularo.

(2) La agado de TEJO konsistas precipe el:

(i) informado en junularaj medioj pri la lingva problemo en internaciaj rilatoj kaj pri ĝia solvo per Esperanto;

(ii) praktika utiligo de Esperanto je la servo de la junularo kaj informado pri tio en junularaj medioj;

(iii) okazigo de kongresoj, konferencoj, seminarioj kaj aliaj kunvenoj; kaj

(iv) instigado al la membroj de TEJO aktive partopreni en la Esperanta movado.

### **ĈAPITRO 2**

#### **AGADPRINCIPOJ**

#### **5. Neŭtraleco**

(1) TEJO kontraŭas diskriminacion rilate al nacieco, raso, sekso, seksa orientiĝo, handikapeco, religio, politiko, socia deveno kaj lingvo.

(2) TEJO estas sendependa de ĉiu ajn partio.

(3) TEJO estas neŭtrala pri aferoj nerilataj al ĝiaj celoj.

#### **6. Esencaj kondiĉoj**

Por la agado de TEJO esencaj kondiĉoj estas:

(i) bonaj internaciaj rilatoj; kaj

(ii) respekto de la homaj rajtoj tiaj, kiaj ili estas difinitaj en la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj kaj aliaj internacie rekonataj instrumentoj.

#### **7. Lingvo**

La sola oficiala lingvo de TEJO estas la internacia lingvo Esperanto tia, kia ĝi estas difinita de:

(i) sia Fundamento,

(ii) la verkaro de sia iniciatinto Ludoviko Zamenhof; kaj

(iii) la ĝenerala lingva uzado sub kontrolo de la Akademio de Esperanto.

### **ĈAPITRO 3**

#### **LANDAJ KAJ FAKAJ SEKCIOJ**

#### **8. Landaj sekcioj**

(1) TEJO instigas al junaj uzantoj de Esperanto en ĉiu lando formi sin en organizon por aliĝi al TEJO kiel landa sekcio.

- (2) La minimumaj kriterioj por landa sekcio estas jenaj:
- (i) ĝi kunigas tra sia lando junajn uzantojn de Esperanto;
  - (ii) ĝi subtenas la celojn de TEJO;
  - (iii) ĝi estas aŭ aparta asocio aŭ integra parto de landa asocio aliĝinta al UEA;
  - (iv) ĝi estas laŭorde organizita;
  - (v) ĝi estas vaste malfermita al junuloj, sen ekskluzivoj pro nacieco, enlanda loĝloko, raso, sekso, seksa orientiĝo, handikapeco, religio, politiko, socia deveno aŭ lingvo;
  - (vi) membreco en ĝi estas libervola; kaj
  - (vii) ĝi estas demokratie gvidata.
  - (viii) havas almenaŭ 3 kalkuleblajn membrojn
- (3) Krom en esceptaj kazoj, TEJO ne havas pli ol 1 landan sektion en ĉiu lando. Pri esceptaj kazoj decidas la Komitato.

## **9. Fakaj sekcioj**

- (1) TEJO instigas al junaj uzantoj de Esperanto, kiuj interesiĝas pri aparta fako, formi sin en organizon por aliĝi al TEJO kiel faka sekcio.
- (2) La minimumaj kriterioj por faka sekcio estas jenaj:
- (i) ĝi kunigas tra la mondo junajn uzantojn de Esperanto, kiuj interesiĝas pri la koncerna fako;
  - (ii) ĝi estas simpatia al la celoj de TEJO;
  - (iii) ĝi estas aŭ aparta asocio aŭ integra parto de faka asocio aliĝinta al UEA;
  - (iv) ĝi estas laŭorde organizita;
  - (v) ĝi estas vaste malfermita al junuloj, sen ekskluzivoj pro nacieco, loĝloko, raso, sekso, seksa orientiĝo, handikapeco, religio, politiko, socia deveno aŭ lingvo;
  - (vi) membreco en ĝi estas libervola; kaj
  - (vii) ĝi estas demokratie gvidata.
  - (viii) havas almenaŭ 3 kalkuleblajn membrojn
- (3) Krom en esceptaj kazoj, TEJO ne havas pli ol 1 fakan sektion por ĉiu fako. Pri esceptaj kazoj decidas la Komitato.

## **ĈAPITRO 4**

### **MEMBROJ**

## **10. Membroj**

- (1) La individuaj membroj estas:

- (i) la individuaj membroj de UEA, kiuj aĝas ne pli ol 35 jarojn je la komenco de la jaro.
- (2) La aligitaj membroj estas:
- (i) la aligitaj membroj de UEA, kiuj aĝas ne pli ol 35 jarojn je la komenco de la jaro.
- (3) La asociaj membroj estas la membroj de la unuopaj landaj aŭ fakaj sekcioj:
- (i) kiuj aĝas ĝis inkluzive 35 jarojn je la komenco de la jaro;
- (ii) kiuj ne estas individuaj aŭ aligitaj membroj; kaj
- (iii) por kiuj la koncerna landa aŭ faka sekcio pagis kotizon egalan al la kotizo por aligita membreco de UEA.
- (4) La Junaj Amikoj de Esperanto estas membroj:
- (i) kiuj aĝas ĝis inkluzive 35 jarojn je la komenco de la jaro;
- (ii) kiuj ne estas individuaj, asociaj aŭ aligitaj membroj; kaj
- (a) deklaras sian volon iĝi juna amiko de Esperanto; aŭ
- (b) estas membroj de la unuopaj landaj aŭ fakaj asocioj por kiuj:
- A. la koncerna landa aŭ faka sekcio ne pagas kotizon al TEJO
- B. la koncerna landa aŭ faka sekcio ne ricevas kotizon.
- (5) La membreco estas persona kaj ne transdonebla.
- (6) La membreco finiĝas:
- (i) Je komenco de nova jaro, post kiam eksvalidiĝas unu el la kondiĉoj kiuj difinas membrecon;
- (ii) Post peto de la membro;
- (iii) Je morto de la membro.
- (7) La Estraro havas la registron de la nomo kaj adresoj de ĉiuj individuaj membroj, de ĉiuj Junaj Amikoj de Esperanto kaj de ĉiuj landaj kaj fakaj sekcioj.

## **11. Patronoj kaj honoritoj**

- (1) La Patronoj estas tiuj, kiuj kontribuis al la financoj de TEJO laŭ kriterioj de TEJO difinitaj.
- (2) La honoritoj estas la Honoraj Prezidantoj kaj Honoraj Membroj elektitaj de TEJO.

## **12. Eksigo**

1. Aliĝinta asocio aŭ individua membro, kiu evidente kontraŭlaboras la celojn de TEJO, morale aŭ materie damaĝas ĝin, aŭ ne kontentige plenumas siajn devojn al ĝi aŭ la minimumajn kriteriojn laŭ la ĉapitro 3, povas esti eksigita el TEJO.
2. Estas kompetentaj la Estraroj de UEA kaj de TEJO kune pri la eksigo de individuaj membroj, kaj la Komitato de TEJO pri la eksigo de aliĝintaj asocioj, patronoj kaj honoritoj de TEJO.
3. Individuaj membroj eksigitaj de la Estraroj rajtas apelacii al la Komitato de UEA kaj al la Komitato de TEJO.

4. Post dujara nemembreco aŭ post nuligo de la eksigdecido fare da la Komitato de TEJO, eksigita asocio rajtas peti permeson denove aliĝi. Pri tio decidas la Komitato de TEJO.

5. Post dujara nemembreco aŭ post nuligo de la eksigdecido fare da la Komitatoj de TEJO kaj UEA, eksigita individua membro, rajtas peti permeson denove aliĝi. Pri tio decidas la Komitatoj de TEJO kaj UEA.

## **ĈAPITRO 5**

### **ORGANOJ KAJ REPRESENTADO**

#### **13. Ĉefaj organoj**

(1) La ĉefaj organoj estas la Komitato kaj la Estraro.

(2) La Komitato konsistas el:

- (i) la komitatanoj A, nomumitaj de la unuopaj sekcioj;
- (ii) la komitatanoj B, elektitaj de la individuaj membroj;
- (iii) la komitatanoj C, elektitaj de la Junaj Amikoj de Esperanto;
- (iv) la komitatanoj Ĉ, elektitaj de la komitatanoj A, B kaj C;
- (v) la estraranoj.

(3) La Estraro konsistas el maksimume 9 estraranoj, inter kiuj estas la Prezidanto, la Ĝenerala Sekretario, la Kasisto kaj unu ĝis tri Vicprezidantoj.

(4) La estraranoj estas elektitaj por difinita mandato (aŭ malelektitaj) de la komitatanoj A, B, C kaj Ĉ. Detalan proceduron difinas Ĝenerala Reglamento.

(5) La anoj de la ĉefaj organoj aĝas almenaŭ 18 jarojn en la tago en kiu ili estas nomumitaj aŭ elektitaj.

(6) Neniu rajtas esti nomumita aŭ elektita al la ĉefaj organoj, se tiu fariĝos 36-jaraĝa (aŭ pli) dum sia mandato.

(7) Prezidanto ne rajtas ofici dum pli ol du sinsekvaj oficperiodoj kaj je la fino de la dua oficperiodo devas retiriĝi el la prezidanteco por almenaŭ unu oficperiodo.

(8) La voĉdonoj en la ĉefaj organoj povas okazi persone dum kunsidoj aŭ maldumkunsido per letero, retpoŝto, aŭ tra ajna alia aktuala komunikadmaniero, ĉu elektronike, ĉu papere, kondiĉe ke la identeco de la sendinto kun sufiĉa sekureco povas esti establita.

(9) Estraraneco povas finiĝi en iu ajn momento:

(i) per eksigo, skribe komunikita al la Prezidanto, Ĝenerala Sekretario, aŭ Ĝenerala Direktoro; (ii) per eksigo fare de la Komitato de TEJO.

#### **14. Reprezentado**

(1) TEJOn reprezentas la Prezidanto en juraj kaj nejuraj aferoj kaj subskribas la ĉefajn dokumentojn.

(2) La Vicprezidantoj laŭbezzone anstataŭas la Prezidanton.

(3) La Estraro povas nomumi reprezentanton, kiu reprezentas TEJOn ene de limoj difinitaj en la nomumo.

## **15. Asembleo**

(1) La asembleo (ĝenerala membrokunveno) de TEJO estas la kunsido de la Komitato.

(2) La kunsidon de la Komitato kunvokas skribe la Ĝenerala Sekretario de TEJO almenaŭ 28 tagojn antaŭ la komenco de la kunsido.

(3) Ĉiu membro de TEJO elektas sian reprezentanton en la Komitato laŭ demokratia maniero.

(4) La Reglamente de TEJO difinas la proceduron de la elekto de la Komitato.

## **ĈAPITRO 6 STATUTŜANĜOJ**

### **16. Amendo**

(1) Se la amendpropono koncernas artikolojn kiuj difinas la rilaton kun UEA, la amendon devas aprobi kaj la Komitato de TEJO kaj la Komitato de UEA.

(2) Aliajn amendojn povas aprobi la Komitato de TEJO, ordinare post konsultado kun la Estraro de UEA.

(3) La Komitato traktas amendon nur se:

(i) En la alvoko al kunsido de la Komitato estis anoncita statuta amendpropono;

(ii) Unu semajnon antaŭ la kunsido la teksto de la amendpropono estis taŭge disponigita al la Komitato;

(4) Amendpropono estas aprobita de la Komitato nur se:

(i) (a) Almenaŭ du trionoj de la ĉeestaj komitatanoj voĉdonas favore al la propono, kaj krome

(b) la ĉeestaj komitatanoj reprezentas almenaŭ duonon de la Komitato; aŭ

(ii) Almenaŭ duono de la Komitato voĉdonas favore al la propono.

## **ĈAPITRO 7 MALFONDO**

### **17. Decido pri malfondo**

(1) Pri malfondo de TEJO povas decidi nur la Komitato.



(2) La Komitato traktas proponon pri malfondo de TEJO same kiel proponon pri amendo de la statuto.

(3) Tiun decidon devas akompani starigo de komisiono de likvidantoj. La komisiono de likvidantoj likvidas la kurantajn aferojn de la Asocio, disponigas rimedojn por kovri eventualan deficiton, donas la eventuale restantajn havaĵojn al Universala Esperanto-Asocio, aŭ kaze ke tio neniel eblas, al alia neprofitcela organizo kun similaj celoj, zorgas pri la libroj kaj arĥivoj de la malfondita TEJO. La malfondo devas sekvi la priskribojn de la unua Titolo de la dua Libro de la nederlanda Civila Kodo.

## REGULARO PRI KUNLABORO INTER TEJO KAJ UEA

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, sekve 'UEA', memstara asocio laŭ la Nederlanda juro kaj ĝia junulara sekcio TUTMONDA ESPERANTISTA JUNULARA ORGANIZO, sekve 'TEJO', celante plifortigi ambaŭ organizojn kaj certigi la efikan funkciadon de TEJO kiel la junulara sekcio de UEA, konsentas kunlabori por nedifinita daŭro surbaze de la principoj kaj procezoj en ĉi tiu regularo.

### ĈAPITRO 1

#### JURO KAJ INTERPRETO

##### 1. Juro

(1) Ĉi tiu regularo validas laŭ la leĝoj de Nederlando.

##### 2. Interpreto

(1) Ĉi tiu regularo estas interpretenda ne nur laŭ siaj vortoj sed ankaŭ laŭ sia spirito.

(2) Kalendaraj aludoj en ĉi tiu regularo estas interpretendaj laŭ la gregoria kalendaro.

(3) La Esperanta teksto de ĉi tiu regularo estas la teksto definitiva.

(4) La Centra Oficejo en ĉi tiu regularo estas la Oficejo de UEA kiun ĝi difinas kiel sia ĉefa oficejo kaj la stabo kiu tie laboras.

### ĈAPITRO

#### 2 FINANCOJ

##### 1. Spezoj

(1) UEA kreditas al TEJO:

(i) dekonon de la kotizoj en la membrokategorio MA-T;

(ii) kvaronon de la kotizoj en la membrokategorio MJ-T;

(iii) kvaronon de la kotizoj en la membrokategorio MG-T;

(iv) duonon de la kotizoj de la aligitaj membroj de TEJO;

(v) duonon de la kotizoj de la asociaj membroj de TEJO;

(vi) la kotizojn de la patronoj de TEJO;

(vii) ĉiujn donacojn, heredaĵojn kaj subvenciojn destinitaj al TEJO;

(viii) la renton tiom, kiom ĝi estas atribuebla al la havaĵo de TEJO.

(2) UEA kreditas al TEJO ĉiujn aliajn enspezojn de UEA tiom, kiom ili estas atribueblaj al TEJO.

- (3) TEJO kreditas al UEA ĉiujn enspezojn de TEJO tiom, kiom ili estas atribueblaj al UEA.
- (4) Rekompence pro la enspezoj per la junularaj kotizoj, UEA ne fakturas al TEJO la servojn kiujn la Centra Oficejo liveras laŭ ĉi tiu regularo, kun escepto de elspezoj pro afranko, telekomunikoj kaj fotokopiado.

## **2. Librotenado**

- (1) La Centra Oficejo librotenas la financojn de TEJO.
- (2) La Centra Oficejo adekvate indikas en sia librotenado de la financoj de TEJO la karakteron kaj devenon de ĉiu unuopa spezo, konsulte kun la kasisto de TEJO.
- (3) La Centra Oficejo disponigas al la kasisto de TEJO la aliron al la ĝisdatigita kontolibro de TEJO.

## **3. Paginstrukcioj**

- (1) La Centra Oficejo pagas sumon el la monrimedoj de TEJO, se:
- (i) ĝi ricevas instrukcion kiu estas aprobita:
    - (a) en okazo de sumo, kiu ne superas la 250-oblon de MA-kotizo por Nederlando, fare de aŭ prokure por la kasisto de TEJO aŭ la Ĝenerala Direktoro - la kasisto kaj la ĝenerala direktoro rajtas fari ĝeneralajn aprobojn ene de tiu limo; aŭ
    - (b) en okazo de sumo, kiu superas tiun limon, fare de aŭ prokure por (1) la Ĝenerala Direktoro kaj (2) la Prezidanto de TEJO; kaze de malkonsento inter (1) kaj (2), decido de la Komitato estas valida; kaj
  - (ii) la sumo ne superas 2 trionojn de la entuta sumo de la monrimedoj de TEJO.
- (2) La Centra Oficejo ne demandas, ĉu difinita paginstrukcio estas donita laŭ rajtigo troviĝanta en Statuta aŭ regulara preskribo de UEA, aŭ en akto de TEJO, kaj kondiĉe, ke la instrukcio mem plenumas la preskribojn de ĉi tiu artikolo, la Centra Oficejo ne respondecas, se tia rajtigo efektive mankas.
- (3) La kasisto de TEJO rajtas mem pagi sumon el la monrimedoj de TEJO, en okazo de sumo kiu ne superas 100-oblon de MA-kotizo por Nederlando.

## **ĈAPITRO 3**

### **SERVOJ DE UEA AL TEJO**

#### **1. Konsiloj kaj kunlaboro**

TEJO ricevas laŭpete la konsilojn kaj kunlaboron de la Ĝenerala Direktoro kaj de aliaj oficistoj de UEA. La Estraroj de UEA kaj TEJO kunlaboras kaj reciproke donas konsilojn unu al la alia laŭokaze kaj laŭpete

## **2. Centra Oficejo**

- (1) La Centra Oficejo disponigas al TEJO siajn telekomunikilojn kaj poŝtan adreson.
- (2) La Centra Oficejo distribuas al la koncernaj respondeculoj laŭ instrukcioj de TEJO tiun poŝton por TEJO, kiu estas ricevita en la Centra Oficejo, kaj traktas ricevitaĵojn telekomunikilojn por TEJO, kiel estas plej konvene por ebligi akuratan respondon.
- (3) La Centra Oficejo regule liveras al la Prezidanto, la Ĝenerala Sekretario kaj la Kasisto de TEJO adekvatajn informojn pri:
  - (i) la spezoj de TEJO;
  - (ii) la unuopaj saldoj de la pasivoj kaj aktivoj de TEJO;
  - (iii) la membroj de TEJO; kaj
  - (iv) la patronoj de TEJO.
- (4) La Centra Oficejo disponigas al TEJO laŭ ties peto du laborstaciojn kun:
  - (i) adekvata komputilo kaj retkonekto;
  - (ii) oficeja fotelo; kaj
  - (iii) adekvataj bretoj kaj tirkesto.
- (5) La Centra Oficejo staplas la stokojn kaj ekipaĵojn de TEJO laŭ ties peto. Se la Ĝenerala Direktoro taksas ke por tio necesas spaco ekster la Oficejo, la proporciaj kostoj estas factureblaj al TEJO.
- (6) La direktoro de la Centra Oficejo zorgas, ke taŭga nomŝildo de TEJO estu fiksita al la strata fasado de la konstruaĵo.

## **3. Reklamado**

Oni reklamas en la eldonaĵoj de UEA laŭ tekstoj liveritaj de TEJO:

- (i) la fakton, ke individua aŭ aligita membro de UEA, kiu aĝas ne pli ol 35 jarojn, aŭtomate estas individua respektive aligita membro de TEJO;
- (ii) la eblecon kotizi al TEJO kiel patrono; kaj
- (iii) la kunvenojn, eldonaĵojn kaj aliajn servojn de TEJO.

## **4. Jarlibro**

UEA aperigas en la Jarlibro ĉapitron pri TEJO surbaze de teksto de TEJO liverita.

## **5. “Esperanto”**

Ordinare, TEJO disponas pri 1 paĝo en ĉiu numero de la revuo “Esperanto” por raporti pri la junulara agado. Pli da paĝoj povas esti interkonsentitaj kun la redaktoro kaze de neceso.

## **6. “Kontakto”**

1. UEA eldonas la revuon de TEJO “Kontakto” kaj la Centra Oficejo zorgas pri ties distribuado al la individuaj membroj de TEJO.
2. La redaktoro de Kontakto estas elektita de la Estraro de TEJO. La elekto de la redaktoro bezonas aprobon de la Estraro de UEA.
3. TEJO kaj UEA garantias al la redaktoro la necesan liberecon por taŭge plenumi siajn taskojn.

## **7. Membrara datum-bazo**

1. UEA donas al la Estraro de TEJO kaj al homoj elektitaj de la Estraro de TEJO la aliron al la membrara datumbazo de UEA, almenaŭ kiam temas pri la datumoj de la individuaj membroj de TEJO kaj patronoj de TEJO.
2. La Ĝenerala Direktoro rajtas rifuzi al specifa homo aliron al la datumbazo, se ial tiu vidas tion necesa, sed devas garantii tiun rajton al almenaŭ unu TEJO-estrarano kaj TEJOstabano.

# **ĈAPITRO 4**

## **RECIPROKA REPRESENTIĜO**

### **1. Estraro de UEA**

- (1) TEJO nomumas observanton ĉe la Estraro de UEA.
- (2) Ordinare, la Estraro de UEA permesas al la observanto la jenajn privilegiojn:
  - (i) ĉeesti ĉiun ĉeestan kunvenon de la Estraro de UEA; kaj
  - (ii) ricevi kopion de ĉiu labordokumento sendita al la tuta Estraro de UEA aŭ sendita de unu estrarano de UEA al ĉiuj aliaj.
- (3) La observanto rajtas komuniki informojn pri la laboro de la Estraro de UEA nur al estraranoj de TEJO kaj aliaj personoj aprobitaj de la Estraro de UEA por la aplikado de ĉi tiu paragrafo, kaj la estraranoj de TEJO respektas la konfidencan karakteron de tiaj informoj.

### **2. Estraro de TEJO**

- (1) La Estraro de UEA nomumas observanton ĉe la Estraro de TEJO.
- (2) Ordinare, la Estraro de TEJO permesas al la observanto la jenajn privilegiojn:
  - (i) ĉeesti ĉiun ĉeestan kunvenon de la Estraro de TEJO; kaj
  - (ii) ricevi kopion de ĉiu labordokumento sendita al la tuta Estraro de TEJO aŭ sendita de unu estrarano de TEJO al ĉiuj aliaj.
- (3) La observanto rajtas komuniki informojn pri la laboro de la Estraro de TEJO nur al estraranoj de UEA kaj aliaj personoj aprobitaj de la Estraro de TEJO por la aplikado de ĉi tiu paragrafo, kaj la estraranoj de UEA respektas la konfidencan karakteron de tiaj informoj.

### **3. Komisiono pri financo kaj administrado**

TEJO rajtas nomumi anon de la komisiono pri financo kaj administrado de UEA.

### **4. Komitato de UEA**

TEJO rajtas esti reprezentata per minimume unu komitatano A en la Komitato de UEA. La nombro de komitatanoj A de TEJO en la komitato de UEA estas po 1 por ĉiu komencita milo da membroj (individuaĵ, aligitaj kaj asociaĵ) ĝis maksimume 4 komitatanoj.

## **ĈAPITRO 5 ŜANĜOJ KAJ NULIGO**

### **1. Ŝanĝoj**

(1) Ĉi tiu regularo pri kunlaboro povas esti ŝanĝita sole post aprobo de la superaj organoj de ambaŭ organizoj, la Komitato de UEA kaj la Komitato de TEJO.

### **2. Nuligo**

(1) Ĉi tiu regularo pri kunlaboro povas esti nuligita sole post aprobo de la superaj organoj de ambaŭ organizoj, la Komitato de UEA kaj la Komitato de TEJO.

## ĜENERALA REGLAMENTO

### DE TUTMONDA ESPERANTISTA JUNULARA ORGANIZO

La teksto estas valida ekde la dato de oficiala akcepto de Statuto de TEJO proponata en julio 2016 al la Komitatoj de UEA kaj TEJO.

#### 1. Membroservoj

La aligitaj kaj asociaj membroj ricevas la samajn membroservojn.

#### 2. Komitatanoj A

(1) Ĉiu landa sekcio rajtas al nombro de komitatanoj A laŭ la jena tabelo:

Kalkuleblaj membroj	Komitatanoj A
3-100	1
101-300	2
301-1000	3
1000+	4

(2) Ĉiu faka sekcio, kiu havas almenaŭ 3 kalkuleblajn membrojn, rajtas al 1 komitatano A.

(3) Kalkulebla membro estas membro de la koncerna sekcio, kiu estas ankaŭ membro de TEJO.

(4) Ordinare, komitatano A estas nomumita ĝis la 30-a de aprilo en para jaro kaj oficas ekde la 1-a de junio en tiu jaro ĝis la 31-a de majo en la sekvanta para jaro.

(5) Komitatano A estas konsiderata kiel demisiinta, se li aŭ ŝi ne estas membro de TEJO tiam, kiam la Komitato kontrolas la konsiston de la ĉefaj organoj laŭ artikolo 6.

(6) Komitatano A estas por difinita kunveno anstataŭigebla kondiĉe, ke la anstataŭanto estas membro de TEJO.

#### 3. Komitatanoj B

(1) Komitatano B estas elektita per sekreta baloto.

(2) La nombro de elekteblaj komitatanoj B estas po 1 por ĉiu komencita cento da individuaj membroj.

- (3) Kandidato por komitataneco B devas esti individua membro de TEJO.
- (4) Ordinare, komitatano B estas elektita ĝis la 30-a de aprilo en para jaro kaj oficas ekde la 1-a de junio en tiu jaro ĝis la 31-a de majo en la sekvanta para jaro.
- (5) Komitatano B estas konsiderata kiel demisiinta, se li aŭ ŝi ne estas individua membro de UEA tiam, kiam la Komitato kontrolas la konsiston de la ĉefaj organoj laŭ artikolo 6.
- (6) Komitatano B ne estas por difinita kunveno anstataŭigebla.

#### **4. Komitatano C**

- (1) Komitatano C estas elektita per sekreta baloto.
- (2) La nombro de elekteblaj komitatanoj C estas 1.
- (3) Kandidato por komitataneco C devas esti individua membro de TEJO.
- (4) Ordinare, komitatano C estas elektita ĝis la 30-a de aprilo en para jaro kaj oficas ekde la 1-a de junio en tiu jaro ĝis la 31-a de majo en la sekvanta para jaro.
- (5) Komitatano C estas konsiderata kiel demisiinta, se li aŭ ŝi ne estas individua membro de UEA tiam, kiam la Komitato kontrolas la konsiston de la ĉefaj organoj laŭ artikolo 6.
- (6) Komitatano C ne estas por difinita kunveno anstataŭigebla.

#### **5. Komitatoj Ĉ**

- (1) Komitatoj Ĉ estas elektitaj per sekreta baloto.
- (2) La nombro de elekteblaj komitatoj Ĉ estas kvarono de la suma nombro de la komitatoj A, B kaj C.
- (3) Kandidato por komitataneco Ĉ devas esti individua membro de TEJO.
- (4) Ordinare, komitatano Ĉ oficas ekde sia elektiĝo ĝis la fino de la oficperiodo de la elektintaj komitatoj A, B kaj C.
- (5) Komitatano Ĉ estas konsiderata kiel demisiinta, se li aŭ ŝi ne estas individua membro de UEA tiam, kiam la Komitato kontrolas la konsiston de la ĉefaj organoj laŭ artikolo 6.
- (6) Komitatano Ĉ ne estas por difinita kunveno anstataŭigebla.

#### **6. Estraranoj**

- (1) Estrarano estas elektita per sekreta baloto.
- (2) Kandidato por estraraneco devas esti individua membro de TEJO.



(3) Ordinare, estrarano estas elektita okaze de la ĉefa kunveno de la Komitato en malpara jaro kaj oficas ekde sia elektiĝo ĝis tuj antaŭ la elekto de estraranoj okaze de la ĉefa kunveno de la Komitato en la sekvanta malpara jaro.

(4) Estrarano, kiu ne estas elektita kiel la Prezidanto, la Ĝenerala Sekretario aŭ la Kasisto, povas esti elektita kiel Vicprezidanto. Ĉiu estrarano rajtas esti elektita por maksimume unu ofico kaj ne rajtas esti elektita al la sama ofico dum pli ol du sinsekvaj mandatoj.

(5) Estrarano estas konsiderata kiel demisiinta, se li aŭ ŝi ne estas individua membro de UEA tiam, kiam la Komitato kontrolas la konsiston de la ĉefaj organoj laŭ artikolo 6.

(6) Estrarano ne estas por difinita kunveno anstataŭigebla.

## **7. Kontrolo**

La Komitato kontrolas la konsiston de la ĉefaj organoj okaze de ĉiu kunveno de la Komitato.

## **8. Aktoj**

(1) La aktoj de TEJO estas la komitataj reglamentoj kaj resolucioj kaj la estraraj decidoj.

(2) Akto estas senvalida tiom, kiom ĝi kontraŭas la Statuton aŭ regularon de TEJO aŭ de organizo kiun TEJO sekcias aŭ membras.

(3) Estrara decido estas senvalida tiom, kiom ĝi kontraŭas komitatan reglamenton aŭ rezolucion.

(4) La Komitato ne povas delegi la faradon de komitata reglamento aŭ rezolucio.

(5) La Estraro povas delegi la faradon de estrara decido kaj ankaŭ rajtigi pluan delegadon.

(6) Reguloj por la funkciado aŭ agado de TEJO, suplementaj al ĝia Statuto kaj al Statuto kaj regularoj de UEA, estas fareblaj nur per komitata reglamento.

## **9. Elpaŝoj**

Ĉiu elpaŝo en la nomo de TEJO devas esti bazita sur rajtigo troviĝanta en Statuta aŭ regulara preskribo de TEJO aŭ en akto de TEJO.

## REGLAMENTO PRI LA INTERNACIA JUNULARA KONGRESO

### 1. Okazigo kaj karaktero

TEJO ĉiujare okazigas sian Internacian Junularan Kongreson ("IJK"), kiu estas manifestacio de la tutmonda esperantista junulara komunumo kaj celas plifortigi la interkomprenon kaj amikecon inter junuloj de ĉiuj landoj.

### 2. Invito

La kongreson invitas landa sekcio aŭ, se mankas landa sekcio en la kongresa lando, alia Esperanta organizo.

### 3. Kongresa kontrakto

(1) La kongreso okazas laŭ kontrakto farita de TEJO kun la invitanto.

(2) La kongresa kontrakto devas enhavi la jenajn kondiĉojn:

- (i) la kongreson organizos kongresa komitato laŭ buĝeto aprobita de TEJO;
- (ii) la kongreso respektos la Statuton kaj regularojn de TEJO;
- (iii) la kongresanoj kontraktos pri sia partopreno kun la invitanto aŭ la kongresa komitato;
- (iv) la kondiĉoj de la unuopaj kontraktoj de partopreno devos esti aprobitaj de TEJO;
- (v) la kongreso pagos al TEJO por la kredito de la ĝenerala spezokonto sumon egalan al 3 procentoj de program-, loĝ- kaj manĝkotizoj;
- (vi) se la Centra Oficejo administras iun kotizon, ĝi subtrahos makleraĵon de maksimume 5 procentoj;
- (vii) la eventuala profito de la kongreso apartenos trione al TEJO por la kredito de la ĝenerala spezokonto, trione al TEJO por la kredito de la Rezervo IJK kaj trione al la invitanto;
- (viii) la eventualan deficiton de la kongreso transprenos:
  - (a) unuavice la Rezervo IJK (aŭ, se ĝi elĉerpiĝos, la Junulara Fondaĵo), sed nur ĝis la pli malalta el:

- (1) dudekono de la sumo de la buĝetitaj kostoj; kaj

(2) triono de la kredita saldo de la Rezervo IJK en la dato de la kongresa kontrakto; kaj

(b) duavice, po duone, la ĝenerala spezokonto de TEJO kaj la invitanto; kaj

(ix) la kongresa komitato regule raportos kaj al TEJO pri la evoluo de la kongresaj financoj.

## KOMITATA REGLAMENTO

### A. DIFINOJ

En tiu ĉi Reglamento:

- i. “La Organizo” signifas Tutmondan Esperantistan Junularan Organizon.
- ii. “La Regularo” signifas la Regularon pri Tutmonda Esperantista Junulara Organizo.
- iii. La terminoj “anstataŭanto”, “Estraro”, “Ĝenerala Sekretario”, “Vicprezidanto”, “Komitato”, “landa sekcio” kaj “faka sekcio” estas uzataj en la sama signifo kiel en la Regularo.
- iv. “UEA” signifas Universalan Esperanto-Asocion tian kia ĝi estas difinita de artikolo 2-2 de la Regularo.
- v. “Prezidanto” signifas la Prezidanton de la Organizo. Okaze de la neĉeesto de la Prezidanto, ĝi signifas homon kiu lin aŭ ŝin anstataŭas.
- vi. “Unua Vicprezidanto” signifas, el pluraj Vicprezidantoj, tiun kiu estas unua laŭvice, el unu Vicprezidanto la Vicprezidanton.
- vii. “Dua Vicprezidanto” signifas, el pluraj Vicprezidantoj, tiun kiu estas dua laŭvice.
- viii. “Tria Vicprezidanto” signifas, el tri Vicprezidantoj, tiun kiu estas tria laŭvice.
- ix. “Kasisto” signifas la estraranon pri financoj de la Organizo.
- x. “Sesio” signifas ĉiun kunsidon de la Komitato kiu ne estas rompita per prokrasto ĝis posta momento aŭ tago, sed povas esti rompita per mallongaj paŭzoj.
- xi. “Kunveno” signifas aron de sesioj, kiuj havas komunajn kunvokon kaj tagordon.
- xii. “Prezidanto de la Komitato” signifas la homon, kiu je iu ajn momento, efektive kaj laŭrajte prezidas sesion.
- xiii. “Komitatano” signifas iun ajn el la homoj tiel menciitaj en artikolo 3-2 ĝis 6 de la Regularo. Dum ties periodo de ofico, ĝi signifas ankaŭ anstataŭanton de komitatano A.
- xiv. “Ĝenerala Direktoro” signifas tiun personon de UEA kiu estas same nomita en paragrafo 44 de la Statuto de UEA.

- xv. “Patrono” signifas subtenanton de la Organizo tian kia li aŭ ŝi estas difinita de artikolo 2-11 de la Regularo.
- xvi. “Membro” signifas individuan, asocian aŭ aligitan membron de la Organizo tiajn kiaj ili estas difinitaj de artikolo 2-10 de la Regularo.
- xvii. “Partopreno” en decido signifas:
  - 1. En kunveno, ĉeeston de komitatano konfirmitan per subskribo; kaze de anstataŭoj koncerna persono rajtas maksimume tri foje partopreni en la sama decido;
  - 2. En poŝta voĉdono, ĝustatempan alvenon de koncerna komitata voĉdonilo al la Ĝenerala Sekretario;
  - 3. En reta voĉdono, retan esprimon de la elekto kadre de la voĉdonsistemo fare de la komitatano.
- xviii. El pluraj eblecoj:
  - 0. “Plimulton” havas tiu, kiun elektis pli da partoprenantoj ol elektis iun ajn unuopan alian eblecon;
  - 1. “Plejmulton” havas tiu, kiun elektas pli ol duono de la partoprenantoj;
  - 2. “Dutrionan plimulton” havas tiu, kiun elektas pli ol du trionoj de la partoprenantoj.
- xix. “Reglamento” signifas tiun ĉi Reglamenton, nome la Komitatan Reglamenton de la Organizo.
- xx. “Reglamentoj” signifas ĉiujn reglamentojn de la Organizo, tiajn kiaj ili estas difinitaj de artikolo 3-7 de la Regularo, konsideratajn ara unuo.
- xxi. “Sindeteni” signifas ne voĉdoni.
- xxii. “Sendi” signifas irigi tiel, ke laŭ supozo de la sendinto, la sendaĵo alvenos ĉe sia celo ne pli ol 15 tagojn poste.
- xxiii. “Kotizinta” signifas, ke la koncerna homo pagis sian kotizon al la Centra Oficejo.

## 1. KOMPETENTECO

- 1. La Komitato estas la supera instanco de la Organizo. Ĝi:
  - 1. difinas la ĝeneralan agadon de la Organizo;
  - 2. elektas estraranojn kaj rajtas eksigi ilin;
  - 3. decidas pri la agado de la Estraro;
  - 4. aprobas la buĝeton kaj ekzamenas la financojn de la Organizo;
  - 5. decidas pri akcepto kaj eksigo de Landaj kaj Fakaj Sekcioj;

6. decidas pri akcepto kaj eksigo de Honoraj Prezidantoj kaj de Honoraj Membroj;
  7. decidas pri eksigo de Patronoj;
  8. decidas pri reglamentoj;
  9. decidas pri aliaj aferoj ne rezervitaj al aliaj organoj aŭ instancoj.
2. La Komitato ankaŭ povas decidi pri ĉiuj aferoj, pri kiuj kompetentas la Estraro aŭ unuopa estrarano; komitata decido tiam nuligas kontraŭan estraran aŭ estraranan decidon.

## 2. KOMITATANOJ KAJ ANSTATAŬANTOJ

1. Ĉiu landa kaj faka sekcio devas nomumi sia(j)n komitatano(j)n A skribe al la Ĝenerala Sekretario. Plej malfrue kun sia nomumo, landa aŭ faka sekcio devas skribe informi la Ĝeneralan Sekretarion pri kiom ĝi pagis al la Organizo pro sia kotizo priskribita de artikolo 2-10(3) de la Regularo. Se landa aŭ faka sekcio pagis tiun kotizon pere de Landa Asocio de UEA aŭ de alia organizo, aŭ se tiun kotizon ricevis UEA, tion devas skribe konfirmi la Landa Asocio aŭ alia organizo aŭ, respektive, UEA, plej malfrue kun tiu nomumo. Nomumo estas nevalida se la Ĝenerala Sekretario ne ricevas tian konfirmon.
2. Landa Sekcio aŭ Faka Sekcio rajtas malnomumi (eksigi) komitatanon A nomumante alian komitatanon A skribe al la Ĝenerala Sekretario.
3. Nomumo de anstataŭanto de komitatano A devas esti farita skribe al la Ĝenerala Sekretario, kaj devas esti skribe aprobita de la koncerna komitatano A kaj de la koncerna Landa aŭ Faka Sekcio.
4. La Ĝenerala Sekretario devas ricevi nomumon de anstataŭanto plej malfrue dum la unua sesio de la kunveno.
5. Ĉiu komitatano A povas nomumi nur unu anstataŭanton por ĉiu kunveno. Se la anstataŭanto jam estas komitatano aŭ anstataŭanto, li aŭ ŝi ekhavas aldonan voĉon. Dum la koncerna kunveno la anstataŭata komitatano havas neniumajn komitatajn rajtojn.
6. Estraranoj rajtas esti anstataŭantoj sole de tiuj landaj kaj fakaj sekcioj en kiuj ili membras, sed nur kondiĉe ke ili estas la solaj membroj kiuj ĉeestas la kunsidon.

## 3. POŜTA VOĈDONO

1. Ĉiu komitatano rajtas postuli poŝtan voĉdonon pri iu ajn decidota punkto. Se la Komitato estas kunvenanta, poŝta voĉdono okazas se la Komitato akceptas la postulon. Se la Komitato ne estas kunvenanta, poŝta voĉdono aŭtomate okazas.
2. Gvidas poŝtan voĉdonadon la Ĝenerala Sekretario.
3. Ĝis la 15a de oktobro, la 30a de januaro kaj la 10a de majo la Ĝenerala Sekretario sendas al la komitatoj la proponojn eventuale alvenintajn ĉe li ĝis respektive la 1a de oktobro, la 16a de januaro kaj la 26a de aprilo. Ĉiun fojon la Ĝenerala Sekretario sendas kun la proponoj voĉdonilon per kiu ĉiu komitatano povas indiki pri ĉiu propono poran aŭ kontraŭan voĉon, aŭ sian sindetenon.
4. Se la Ĝenerala Sekretario ne ricevis proponojn ĝis la limdato, tiam li aŭ ŝi ne devas skribi al la komitatoj por informi ilin pri tio.
5. Por ke estu validaj la voĉdoniloj, ili estu sendataj de la voĉdonantaj komitatoj ene de 45 tagoj (validas la poŝta stampo) post ilia forsendo. Definitiva kalkulo de la voĉdoniloj okazas 90 tagojn post la forsendo far la Ĝenerala Sekretario.
6. Se plejmulto de la partoprenantoj ne sindetenas, tiu el la poro kaj la kontraŭo kiu havas la plimulton venkas. Okaze de egaleco decidas la Prezidanto. Se simpla plejmulto de la voĉdonantoj sindetenas, oni konsideras tion decido ne voĉdoni poŝte pri tiu propono.
7. La Ĝenerala Sekretario sendas al la komitatoj, landaj kaj fakaj sekcioj informon pri la rezulto de ĉiu poŝta voĉdono plejmalfrue 105 tagojn post la forsendo de la voĉdoniloj.
8. La poŝta voĉdonado okazu laŭ la proceduro priskribita en Reglamento pri elekto de komitatoj B (en la paragrafoj 5, 6, 7 oni anstataŭigu la vorton “kandidatoj” per la vorto “proponoj”).

#### ▪ RETA VOĈDONO

1. Ĉiu komitatano rajtas postuli retan voĉdonon pri iu ajn decidota punkto. Se la Komitato estas kunvenanta, reta voĉdono okazas se la Komitato akceptas la postulon. Se la Komitato ne estas kunvenanta, reta voĉdono aŭtomate okazas.
2. Se du komitatoj postulas sekretan voĉdonon, tiam la balotado okazu laŭ sekreta reta voĉdono. Se sekreta reta voĉdono ne eblas teknike, tiam la balotado okazu poŝte anstataŭ rete.
3. Gvidas retan voĉdonadon la Ĝenerala Sekretario.
4. La Komitato povas laŭ bezono per decido ŝanĝi la teknologion uzatan por retaj voĉdonoj.
5. La proceduro komenciĝas per la ricevo de la propono far la Ĝenerala Sekretario. Plej malfrue unu semajnon post la ricevo de la propono, la Ĝenerala Sekretario ekigas la balotadon per reta informo al la komitatoj.

6. La balotado daŭras 14 tagojn. La Estraro anoncu la rezulton plej malfrue 3 tagojn post la fino de la balotado.
7. Reta voĉdono estas kvoruma se almenaŭ duono de la komitato voĉdonas. Sindetenoj ankaŭ estas voĉdonoj.
8. Se plejmulto de la partoprenantoj ne sindetenas, tiu el la poro kaj la kontraŭo kiu havas la plimulton venkas. Okaze de egaleco decidas la Prezidanto. Se simpla plejmulto de la voĉdonantoj sindetenas, oni konsideras tion decido ne voĉdoni retroŝte pri tiu propono.

#### ▪ OKAZO KAJ KUNVOKO DE KUNVENO

1. Ordinara komitatkunveno okazas unu fojon jare; krome, eksterordinaraj komitatkunvenoj okazas laŭnecese.
2. Ordinara kunveno okazas dum, kaj en la kadro de, la Internacia Junulara Kongreso (IJK). Se la kunvokanto opinias tion utila, ĝi povas komenciĝi maksimume tri tagojn antaŭ la IJK aŭ finiĝi tri tagojn post la IJK.
3. Kunvokas ordinaran kunvenon la Ĝenerala Sekretario, kiu sendas skriban inviton al ĉiu homo nomumita kiel komitatano por la koncerna oficperiodo, ĉiu anstataŭanto kaj al la Ĝenerala Direktoro, kaj kopie al ĉiu landa kaj faka sekcio almenaŭ 30 tagojn antaŭ la komenco de la kunveno. Kun la invito estas sendata la tiam valida teksto de la Regularo kaj de la reglamentoj.
4. Eksterordinara kunveno okazas kiam tion postulas aŭ la Estraro, aŭ kvinono de la komitatanoj, aŭ la Estraro de UEA se ĉi tiu opinias ke la Estraro de la Organizo ne funkcias kaj ke tiu nefunkciado devas esti urĝe traktata.
5. Kunvokas eksterordinaran kunvenon aŭ la Ĝenerala Sekretario aŭ la instanco kiu postulas ĝin. La kunveno devas okazi en urbo, elektita de la kunvokanto, kie estas oficejo de la Organizo/UEA, aŭ en internacia Esperanto-renkontiĝo tiucele aprobata de la Estraro de TEJO. La kunvokanto sendas skriban inviton al ĉiu komitatano, ĉiu anstataŭanto kaj al la Ĝenerala Direktoro kaj kopie al ĉiu landa kaj faka sekcio, almenaŭ 50, sed ne pli ol 80, tagojn antaŭ la komenco de la kunveno. La invito informas pri la loko, tago kaj horo de la unua sesio de la kunveno, kaj enhavas proponon pri la tagordo.

#### ▪ PARTOPRENO EN KUNVENO

1. Ĉiu komitatano povas ĉeesti, paroli kaj voĉdoni en ĉiu kunveno de la Komitato.
2. Ĉiu membro, Honora Membro, Honora Prezidanto, Patrono, komisionano kaj komisiito de la Organizo povas ĉeesti kaj paroli en ĉiu kunveno de la Komitato. La Komitato povas tamen decidi ke iu(j) aŭ ĉiuj el ĉi tiuj ne povas paroli.



3. Ĉiu homo ne jam aludita povas ĉeesti, sed ne povas paroli, dum ĉiu kunveno, se la Komitato ne decidas kontraŭ ties ĉeesto. La Komitato tamen povas decidi ke iu(j) aŭ ĉiuj el tiuj ĉi povas paroli.

4. La artikoloj 3.5, 13.2 kaj 15.3 de la Reglamenteo ne kontraŭas tiun ĉi paragrafon.

#### ▪ DUMKUNVENAJ LABORORGANOJ

1. La dumkunvenaj labororganoj de la Komitato estas la Propona Komisiono kaj la Voĉdona Komisiono. Ĉiu labororgano havas almenaŭ du membrojn.

2. Por ĉiu labororgano la Estraro aŭ la kunvokinto proponas liston de membroj, kiun la Komitato eventuale modifas ĝis ĝi akceptas la proponon.

3. La Propona Komisiono laŭpete helpas komitatanojn pretigi proponojn por la Komitato. Antaŭ la elektoj ĝi ankaŭ prezentas al la Komitato la nomojn de ĉiuj kandidatoj. La Komisiono povas rekomendi kandidatojn kiuj, laŭ la takso de la Komisiono, bone plenumus la respondecojn de la koncernaj oficoj se ili estus elektitaj. Membroj de la Komisiono ne kandidatas.

4. La Voĉdona Komisiono kontrolas la komitatanecon de ĉiu homo, kiu deziras partopreni la kunvenon kiel komitatano, kontrolas la kvorumon kaj laŭnecese nombras voĉojn dum la kunveno kaj raportas al la Komitato. Membroj de la Komisiono ne kandidatas.

#### ▪ KVORUMO

1. Kunveno estas kvoruma kaj decidopova kiam ĝin partoprenas almenaŭ triono de la komitatanoj.

2. Kvorumon en kunveno kontrolas la Ĝenerala Sekretario kaj, post la starigo, la Voĉdona Komisiono.

#### ▪ TAGORDO

1. Proponojn pri tagorderoj oni sendas al la kunvokanto plejmalfrue 15 tagojn antaŭ la komenco de la kunveno.

2. La kunvokanto kompilas por la kunveno tagordproponon kiu enhavas ĉiun proponitan eron kaj krome la jenajn devigajn erojn:

1. Malfermo

2. Eventuala elekto de prezidanto de la Komitato

3. Proponoj pri:

▪ Voĉdona Komisiono

▪ Mandata Komisiono

▪ Propona Komisiono

4. Fikso de cetera tagordo
3. La tagordproponon estas prezentita al la kunveno je la malfermo, kaj la kunveno laboras laŭ ĝi ĝis inkluzive ero 4.
4. La kunveno tiam amendas la tagordproponon eventuale aldonante, modifante aŭ nuligante erojn ĝis la akcepto de la tuta propono.
5. Post tiu akcepto eblas amendi la tagordon nur per dutriona plejmulto.

#### ▪ PREZIDADO KAJ PROTOKOLADO

1. La Komitaton prezidas Kunsidestro elektata de la Komitato mem. Ordinare la Estraro proponas unu aŭ pli da eblaj kunsidestroj plejmalfrue unu monaton antaŭ la Komitatkunsido kaj la Komitato elektas per reta voĉdono. Prefere la Kunsidestro ne estu Komitatano.
2. Respondecas pri la protokolado de la kunveno de la Komitato la Ĝenerala Sekretario. La Ĝenerala Sekretario povas laŭbezone nomumi protokolantojn.
3. La Ĝenerala Sekretario sendas unu kopion de la protokolo al ĉiu komitatano, anstataŭanto, landa kaj faka sekcio, ene de 30 tagoj.
4. La protokolo ekvalidas 15 tagojn post ĝia dissendo se en tiu periodo neniu ĉeestinta komitatano aŭ anstataŭanto postulas retan voĉdonon, proponante specifan ĝustigon. La valida protokolo estas la unusola aŭtoritata dokumento pri la kunveno.

#### ▪ PROCEDURO

1. Post akcepto de la tagordo, la Komitato traktas ĉiun tagorderon laŭvice, sub gvido de la Prezidanto de la Komitato.
2. Ekparoli oni povas nur post permeso de la Prezidanto de la Komitato, kiu ankaŭ povas fari liston de la parolantoj. La Komitato povas laŭbezone decidi pri limigo de la paroldaŭro de ĉiu parolanto dum la trakto de difinita tagordero.
3. Se ne prezentiĝis specifa propono pri iu tagordero, komitatano povas paroli ĝenerale pri tiu tagordero, aŭ povas prezenti specifan proponon rilate ĝin.
4. Se prezentiĝis specifa propono pri iu tagordero, komitatano povas paroli pri tiu propono aŭ povas proponi amendi ĝin.
5. Kiam neniu komitatano deziras plu paroli pri iu propono aŭ amendo-propono, la Prezidanto de la Komitato fermas la diskutadon pri tiu, kaj voĉdonigas la Komitaton.
6. Malgraŭ la ceteraj artikoloj de paragrafo 11 de la Reglamento, komitatano rajtas fari unu el la jenaj proceduraj proponoj (kiuj estas tiuj voĉdonendaj sen diskuto) kiam ajn dum la konsido, akirinte parolpermeson de la Prezidanto de la Komitato:

1. Tuj voĉdoni pri la propono diskutata;
2. Tuj voĉdoni pri la amend-propono diskutata;
3. Paŭzi dum dek minutoj;
4. Fermi la diskutadon sen voĉdono kaj ekstrakti la venontan tagorderon;
5. Okazigi poŝtan voĉdonon laŭ paragrafo 4 de la Reglamento.
6. Okazigi retan voĉdonon laŭ paragrafo 5 de la Reglamento.

#### ▪ VOĈDONO EN KUNVENO

1. Post fermo de la diskuto pri iu propono aŭ amendo- propono, oni voĉdonas pri tiu.
2. Gvidas la voĉdonon la Prezidanto de la Komitato. Krom laŭ la proceduro priskribita en artikolo 13.4 de la Reglamento, la Prezidanto de la Komitato ne rajtas voĉdoni.
3. Pri ĉiu propono partoprenanto aŭ voĉdonas aŭ sindetenas. La Voĉdona Komisiono nombras kiom da partoprenantoj voĉdonas por, kaj kiom voĉdonas kontraŭ. La protokolanto kalkulas kiom da partoprenantoj sindetenas.
4. Se plejmulto de la partoprenantoj ne sindetenas, tiu el la poro kaj la kontraŭo kiu havas la plimulton venkas. Okaze de egaleco, decidas la Prezidanto de la Komitato.
5. Se plejmulto de la partoprenantoj sindetenas:
  1. Se temas pri la unua voĉdono pri tiu propono, aŭ pri decido nepre fareda pro priskribo de la Regularo aŭ Reglamento oni remalfermas la diskuton pri tiu propono kaj, kiam tiu dia diskuto estas finita, voĉdonas duan fojon.
  2. Se ne temas pri la unua voĉdono de la Komitato pri tiu propono, oni konsideras tion decido ne voĉdoni pri tiu propono.
6. Krom laŭ la proceduro priskribita en artikolo 13.5 de la Reglamento, oni voĉdonas nur unu fojon pri iu propono dum unu kunveno.
7. En paragrafo 13 de la Reglamento, “propono” signifas ankaŭ amendo-proponojn.

#### ▪ SEKRETA VOĈDONO

1. Ĉiu voĉdono pri elekto de estrarano, komitatanoj Ĉ, komisiitoj kaj komitatanoj A de UEA por la Organizo (sed ne membroj de la labororganoj) estas farita sekrete laŭ la proceduro priskribita en paragrafo 13 de la Reglamento.
2. Sekreta voĉdono okazas ankaŭ por decido pri regularŝanĝo, Honora Membro, Honora Prezidanto, akcepto aŭ eksigo de landa aŭ faka sekcio kaj krome kiam ajn du komitatanoj tion postulas. Tiam sekreta voĉdono okazas laŭ la proceduro priskribita en paragrafo 13 de la Reglamento.

3. Okaze de sekreta voĉdono, gvidas la voĉdonadon kaj nombras la voĉojn la Voĉdona Komisiono.

▪ ELEKTOJ

1. Ĉiu elekto por la oficoj menciitaj en artikolo 14.1 de la Reglamento okazas laŭ la proceduro priskribita en paragrafo 15 de la Reglamento.
2. Gvidas la voĉdonadon kaj nombras la voĉojn la Voĉdona Komisiono.
3. Krom laŭ la proceduro priskribita en artikoloj 15.7.4 kaj 15.8.4 de la Reglamento, la Prezidanto de la Komitato ne rajtas voĉdoni.
4. La tenantoj de la oficoj en la Estraro de TEJO, nome la Prezidanto, la Vicprezidanto(j), la Ĝenerala Sekretario kaj la Kasisto, devas esti elektitaj al specifa ofico. Tio signifas, ke devas okazi aparta elekto por ĉiu el tiuj oficoj. Oni voĉdonas unue por la Prezidanto, due por la Vicprezidanto(j), trie por la Ĝenerala Sekretario kaj kvare por la Kasisto.
5. Kiam la nombro de elekteblaj kandidatoj ne estas priskribita de la Regularo, la Komitato devas unue decidi kiom da ofico-tenantoj ĝi maksimume elektos, antaŭ ol ĝi elektas. Pro la proceduro priskribita en artikolo 15.7 de la Reglamento, povas esti elektitaj malpli da ofico-tenantoj ol la maksimumo decidita de la Komitato, sed ne povas esti elektitaj pli da ofico-tenantoj ol tiu maksimumo.
6. En artikoloj 15.7 kaj 15.8 de la Reglamento la simbolo “m” signifas la maksimuman nombron de elekteblaj kandidatoj, kaj la simbolo “2m” signifas duoblon de la maksimuma nombro de elekteblaj kandidatoj.
7. Se ne estas pli ol “2m” kandidatoj:
  1. Oni faras balotilon kun la nomo de ĉiu kandidato, ordigita laŭ la ĉefa nomo skribita nacilingve per latinaj literoj.
  2. Partoprenantoj voĉdonas por kandidato metante ikson apud ties nomo, Ĝis maksimumo de “m” kandidatoj. Oni neaparte indikas tiujn kandidatojn, kiujn oni ne elektis. Estas nevalidaj tiuj balotiloj kiuj havas pli ol “m” iksoj.
  3. Estas konsiderataj elektitaj tiuj “m” kandidatoj kiuj havas plej multe da voĉoj, kondiĉe ke ili ankaŭ ricevis porajn voĉojn de almenaŭ plejmulto de la validaj balotiloj.
  4. Okaze de egaleco inter kandidatoj, decidas la Prezidanto de la Komitato.
  5. Kaze ke post la baloto ne estus elektitaj sufiĉe da homoj por plenigi la postenojn difinitajn en la artikolo 2.12.3 de la Regularo, oni remalfermas kandidatiĝojn surloke por la vakantaj oficoj. Oni denove voĉdonu laŭ la proceduro priskribita en la artikolo 15.7 aŭ 15.8, depende de la nombro de la novaj kandidatoj.

6. Post dua sinsekva baloto laŭ la artikolo 15.7.5 sen sukcesa elekto de homo(j) por ofico(j), oni sekvu proceduron laŭ la artikolo 15.9 de la Komitata Reglamento.
  8. Se estas pli ol “2m” da kandidatoj:
    0. Oni faras balotilon kun la nomo de ĉiu kandidato, ordigita alfabete laŭ la ĉefa nomo skribita nacilingve per latinaj literoj.
    1. Partoprenantoj voĉdonas por kandidato metante ikson apud ties nomo, ĝis maksimumo de “2m” kandidatoj. Oni ne aparte indikas tiujn kandidatojn, kiujn oni ne volas elekti. Estas nevalidaj tiuj balotiloj kiuj havas pli ol “2m” iksojn.
    2. Tiuj “2m” kandidatoj kiuj havas plej da voĉoj iras al dua voĉdono, organizita laŭ la proceduro priskribita en artikolo 15.7 de la Reglamento.
    3. Okaze de egaleco de voĉoj inter kandidatoj, decidas la Prezidanto de la Komitato.
  9. Se ne sukcesis du sinsekvaj balotoj laŭ la artikolo 15.7:
    0. Oni okazigas voĉdonadon en kiu la Komitato rajtas voĉdoni por iu ajn Individua Membro de TEJO;
    1. Estas validaj voĉdonoj kie la nomo estas skribita nekomplete, esperantige, uze de kromnomo, kun nekutima latinliterigo aŭ ortografia eraro, kondiĉe ke tutkonsente laŭ la Voĉdona Komisiono la volo de la elektanto estas klara preter ĉiu nepreteksta dubo kaj ne estas risko de konfuzo kun alia membro de TEJO;
    2. Tiuj “2m” kandidatoj kiuj havas plej multe da voĉoj iras al la dua voĉdono, organizita laŭ la proceduro priskribita en la artikolo 15.7 de la Komitata Reglamento.
    3. Okaze de egaleco de voĉoj inter kandidatoj, decidas la estraranoj kiuj ĉeestas, krom la Prezidanto de la Komitato. Se denove estas egaleco de voĉoj, decidas Prezidanto de la Komitato.
    4. Elektita kandidato kiu ne mem kandidatiĝis devas esti tuj kontaktita persone, telefone aŭ rete de la Prezidanto de la Komitato por peti lian akcepton de la ofico.
    5. Kaze ke la elektito malakceptas aŭ dum akceptebla tempokvanto la Prezidanto de la Komitato ne sukcesas kontaktiĝi kun li, la Komitato komencas novan baloton laŭ la sama proceduro. La eblo akcepti la postenon ĉesas kiam alia elektita kandidato akceptas ĝin.
- **KOMISIONOJ**
    1. La Estraro povas starigi komisionon por labori pri iu agadkampo de TEJO.
    2. Ĉiu komisiono havas respondeculon ene de la Estraro.

3. Ĉiun komisionon kunordigas komisiito elektata de la Estraro. La Komitato povas, laŭ peto de almenaŭ du membroj de la komisiono, malvalidigi la elekton kaj taski al la Estraro elekton de alia komisiito.
4. Komisiitoj devas esti rekonfirmitaj de la Estraro okaze de ĉiu kunveno de la Komitato.
5. La komisiito regule raportas al la Komitato pri la laboroj de la komisiono.
6. Ĉiuj Individuaj Membroj de TEJO rajtas membriĝi en la komisionoj, pere de la skriba peto al la koncerna komisiito.
7. Neindividuaj membroj kaj nemembroj de TEJO, kiuj pro speciala kompetento povas grave kontribui al la laboro de la komisiono rajtas membriĝi en la komisionoj post la aprobo de la koncerna komisiito aŭ de la Estraro.
8. Komitatanoj je la elektiĝo rajtas elekti en kiuj komisionoj membri, sed ĉiu komitatano devas membri en almenaŭ unu komisiono.
9. Membroj de la komisionoj devas esti rekonfirmitaj de la komisiito aŭ de la Estraro unu monaton antaŭ ĉiu kunveno de la Komitato.
10. Komisionoj laŭeble kunvenas okaze de ĉiu kunveno de la Komitato.

▪ **INTERPRETADO**

1. Pri demandoj ne tuŝitaj en la Reglamento validas laŭvice aliaj reglamentoj, la Regularo, la Regularo de la Komitato de UEA, la Statuto de UEA, kaj la Ĝeneralaj reguloj de la nederlanda juro.
2. Nenio en la Reglamento povas kontraŭi la Regularon.
3. La Komitato povas modifi la Reglamenton per decido de plejmulto.

## REGLAMENTO PRI ELEKTO DE ESTRARANOJ

### A. STARIGO DE ELEKTA KOMISIONO

1. Tuj post elekto de nova estraro, la komitato nomumas la membrojn de Elekta Komisiono.
2. Okaze de malmembriĝo de membro de la komisiono, la estraro rajtas nomumi novan membron. La Komitato validigas tiun ŝanĝon per reta voĉdono.
3. Rajtas membri en la komisiono:
  - Komitatanoj de TEJO
  - Komisiitoj de TEJO
  - Eksaj estraranoj de TEJO
  - Individuaj membroj de TEJO kiuj pro speciala kompetenteco povas fari gravan kontribuon al la laboro de la komisiono.
4. Ne rajtas membri en la komisiono ajna kandidato al la nova estraro.
5. Estraranoj kiuj kandidatiĝas por la nova Estraro konsilas al la Komisiono.

### ▪ KOMPETENTECO DE LA ELEKTA KOMISIONO

1. La Elekta Komisiono serĉas kandidatojn por la nova Estraro kaj akceptas kandidatiĝojn.
2. La Komisiono esploras ĉu kandidato estas taŭga por posteno en la estraro, aŭ eventuale rekomendas ekster-estraran postenon.
3. Plej laste dum la komitatkunveno, la Komisiono rekomendas al la Komitato kandidatojn al la nova Estraro.
4. La komisiono priesploras, konsilas kaj laŭeble okazigas trejnkurson por kandidatoj al la Estraro.
5. La laboro de la komisiono finiĝas en la momento de elektiĝo de la nova Estraro.

### ▪ TAŬGECO DE KANDIDATOJ

Por decidi pri la taŭgeco de la kandidatoj, estas rekomendite ke la Elekta Komisiono uzu inter aliaj la jenajn konsiderojn:

1. Kandidatoj sin anoncu ĉe la Centra Oficejo aŭ ĉe la komisiono mem minimume duonan jaron antaŭ la komitatkunveno dum kiu okazu la elektoj.
2. Nova kandidatiĝo konsistas minimume el vivresumo kaj motiviga letero.

3. Novaj kandidatoj rajtas kandidatiĝi por ĉiu ajn posteno krom tiu de Prezidanto. Escepto al tio validas nur kaze de risko ke la posteno de Prezidanto restos vaka.
4. Spertoj de la kandidato.
5. Kapablo de la kandidato kunlabori en teamo.
6. Trejnkursoj ĉeestitaj de la kandidato.
7. Partopreno de la kandidato en almenaŭ unu estrarkunsido.
8. Pozitive estas se kandidato jam iel (ekzemple kiel komisiito aŭ volontulo) aktivas rekte en TEJO.
9. Kandidato estu preta iĝi komisiito por kunlabori kun la estrarano kies postenon li aŭ ŝi ŝatus transpreni.
10. La Komisiono zorgas ke inter la kandidatoj al la Estraro estu sufiĉe da diversaj kompetentoj kaj lertoj por kovri la ĉefajn agadkampojn de la Estraro. La Komisiono serĉu la kandidatojn strebante kunmeti teamon el diversa aĝo, genro kaj loĝloko.